

OOMOTO


INTERNATIONAL

1933

Julio

Oomoto Centra Oficejo

Kameoka Kioto-hu Japanujo



KVINTESENCO DE OOMOTO

Deveno kaj Celo: La vorto «Oomoto» signifas Fundamenton. La Fundamenta (aŭ Centra) Dio, Kreinto de la Universo, aperis en la sankta loko Ajabe (Japanujo) en la jaro 1892 kaj deklaris per de Sinjorino *Nao Deguĉi* sian planon por la reformo de la Mondo. Ni nomas Sinjorinon *Nao Deguĉi* la «Fondintino» de Oomoto. La Dia Reformplano konsistas en la ekstarigo de pli perfekta mondo, verdire la ĉielregno baldaŭ venos sur la Teron. Oomoto-Movado fervore laboradas por la baldaŭa efektivigo de la Dia Plano.

Nuna Stato de Oomoto: Post la ĉieliro de la Fondintino, nia movado daŭrigis sian agadon sub la aŭtoritata gvidado de Majstro Onisabro *Deguĉi*, adoptita filo de la Fondintino. Li estas eksterordinara homo, vera geniulo, eminenta en diversaj artoj kaj scioj. La nuna mondo baraktas meze de ekonomiaj, sociaj, politikaj kaj aliaj malsanoj. Ni firme kredas, ke nia spirita Gvidanto estas la de Dio destinita Homo, sole kapabla piloti la ŝipon de la Homaro el inter la rifoj de hodiaŭo al la paca haveno de morgaŭo.

La Centro de Oomoto sin lokas en Ajabe, la Administrejo en Kameoka (Japanjo), Lokaj Centroj en Mukdeno kaj San Paŭlo, kaj pli ol 1,600 filioj ekzistas ne nur en Japanjo sed tra la mondo. Krom pluraj japanlingvaj organoj, internacia monata gazeto «OOMOTO INTERNACIA» aperas en Kameoka. Nia Doktrino estas tolerema: ni unuigas kun Orientaj potencaj spiritmovadoj kiel Tao-Yuan kaj Universala

Rugsvastika Asocio; ni ankaŭ kunlaboras kun pluraj spiritaĵmovadoj — Tsaili-Hui, P'uch-Hui, Anching-Chao, Lamaismo en la Oriento kaj Novspirito kaj Blanka Frataro en la Okcidento. Ni ankaŭ fondis Universalan Homaman Asocion kaj Ligon de Religioj, kiuj bone laboras por la mondopaco. Ni vokas al ĉiuj tutmondaj gesamideanoj je komuna kunlaborado por pli bona kaj pli bela estonteco.

Maksimoj:

1. Observu la veran aspekton de la Universo kaj konsideru, ke ĝi respegulas la *Korpon de Dio*.
2. Konsideru la seneraran funkciadon de la Universo kaj rekonu la *Forton de Dio*.
3. Konsideru la koron de la vivantaĵoj kaj komprenu ke ĝi estas koncipita de la *Animo de Dio*.

Ĉefinstruo:

Dio estas spirito loĝanta en ĉio de la Universo, kaj homo estas la reganto de la mondo. Kie unuigas Dio kaj homo, tie ekestigas senlimaj fortoj kaj aŭtoritateco.

Devizoj:

1. Harmonio inter Dio kaj homaro.
2. Instruo pri Dia Vero.
3. Fundamenta moralo.
3. Sankta karaktero de la misio.

Principoj:

1. Pureco de animo kaj korpo.
2. Unuigo inter klasoj de la socio.
3. Optimismo pri la aranĝo de Dio.
4. Progresemo por la socia plibonigo.

OOMOTO INTERNACIA

MONATA ORGANO DE OOMOTO-MOVADO KAJ DE UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO

J A R O I X

Julio 1933

N - R O 7 (95)

Ĉefredaktoro: Koogecu NIŜIMURA.

Redaktoro: Jozefo MAJOR.

Por ĉiu artikolo respondas la subskribinto.

Pri kotizoj ktp. legu lastan paĝon.

Adreso de Redakcio kaj Administracio: Oomoto Centra Oficejo, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

Epitafe al la Ekonomia Konferenco

Koogecu Niŝimura

La fino de julio alportis libertempon al la ĉiunaciaj delegitoj ŝivitantaj en la varmegaj kunvenejoj de Londono. Al la materialisma mondo tiu ĉi fiasko de politikistoj kaj ekonomiistoj venis kiel grava ŝoko, kiel humiliga seniluziigo; al ni, spiritalistoj, ĝi estas memkomprenebla fenomeno, kva-zaŭ naturleĝo. De la komenco ni profetis: *oni ne savos la mondon per materiaj rimedoj!*

Kaj tamen, Oomotanoj neniel gojas pro la malsukceso de siaj plej obstinaj kontraŭuloj, tiuj faktecaj negocistoj kiuj pretendas esti la solaj savantoj de l' mondo, en kiu ili mem puŝis ĝin, scie aŭ sence. Meze de l' funebra malfeliĉo de ĉia mondo — materie kaj spirite — ĉiuj rimedoj estas bonaj. Tial Oomotanoj sincere ĉagreniĝas ankaŭ pro la fiasko de l' ekonomia rimedo. Oni povas pretendi, ke la Konferenco havos trimonatan libertempon kaj poste oni denove kunvenos kaj ellaboros sensaciajn projektojn por revenigi prosperecon laŭ la sama maniero.... oni bonvolos permesi, ke ni estu niavice skeptikaj pri la kredebleco de tia blago.

Lastatempe, sur la paĝoj de HEROLDO de ESPERANTO, la ĉefredaktoro demandis, ĉu ni vere kredas, ke Oomoto *sola* elkondukos la mondon el la nuna ĥaoso; aliaj movadoj religiaj, sociaj, ktp., ankaŭ laboras por la sama celo. Denove ni asertas en tiu ĉi loko: *ĉiuj rimedoj estas bonvenaj, kondiĉe ke ili estu sinceraj kaj efikaj.* Pri la historiaj religioj ĉiuj bone konas. Budaismo, Kristanismo, Mahometanismo kaj tiom da grandaj, universalaj kredoj agadas jam de jar-

miloj — bedaŭrinde kun malgranda rezultato. La diversaj Evangelioj estas konsiderataj de l' popolamasoj kiel tiom da sankteca beletristiko, admirinda kaj laŭdinda principaro... sed kiam preskaŭ neniu sekvas. Tiu ĉi aferstato estas ja natura, ĉar la spirito mortis en la historiaj kredoj kaj ili rigidigis. Nia mondo bezonas *vivantajn religiojn*, konforman al la epokspirito.

Kaj nun mi aŭdas la kontraŭdiron de niaj antagonistoj: jes, sed ĉu vi pretendas, ke Oomoto estas preferinda al ekonomio kaj al historiaj religioj? Ĉu Oomoto alportas ion novan? Al tiu ĉi demando mi donos eble neatenditan respondon: Ni ne kredas, ke Oomoto estas absolute novaĵo; ni ne pretendas esti la solaj kiuj estas absolute originalaj, absolute pravaj kaj absolute fortegaj, venkontaj ĉiujn aliajn! Ni deziregas kunlaboradi kun ĉiuj sinceraj fortoj, ambaŭ sur religia kaj ekonomia kampo. Tio ĉi estas la signifo de l' Sintezo anoncita de majstro O. Deguĉi. Tio ĉi manifestiĝas en la Ligo de Religioj, de li fondita tiu ĉi spirito materiigis en la Domo de Homamo baldaŭ konstrota kaj tio ĉi estas ankaŭ la spirito de l' zamenhofa Homaranismo, de l' Esperanto-movado: la Krea Evoluo, la Sankta Spirito, kaj tiom da aliaj konceptoj signifas finfine ĉiam la samon. Se la ekspertoj de l' Ekonomia Konferenco ne sukcesis, ni ne devas do malesperi. Ilia malsukceso estis atendata, ĝi estas natura kaj memkomprenebla. Sed la granda spirito, kiun religiemaj animoj nomas Dio, ne povas malsukcesi, kaj en Li ni fidu kiam ni esperas la venon de pli feliĉa mondo.

Estu Larg'vida

— Hidemaru Degûci —

ĈAR la infano estas indiferenta pri malriĉeco li restas tute trankvila kiam la gepatroj baraktas en la faŭko de senhaveco. Ĉar la komercisto tutligas sin kun negoco li ofte maldormas la nokton tangante ĉe eta ondo de la kurzo. Por tiu kiu intencas ekskurson gravas ke la vetero estas iom malhela, dum por aliaj familianoj tio samtempe neniom gravas. Penso asocias diversajn zorgojn kaj ignoro ne scias timon pli ol blindulo antaŭ serpento.

Eĉ se la pluvo falas por iom da tempo, ni ne zorgas ĉar ni scias, ke pli-malpli frue heligos, sed kiam eta malfavoro falas sur nin, ni emas tuj ĉagreniĝi anticipante malfeliĉan flankon de la afero kun veanta malespero. Estas strange, ĉar eĉ tiu, kiu havas prudenton juste juĝi la okazon de la aliaj, ofte enmetiĝas en labirinto en la okazo de si mem kaj eĉ fiaskas en tia kazo rekonu la rutinon de la naturo, ke pluvon sekvas la suno, lumo venas post mal-lumo kaj floroj floras kaj velkas. Jen tio ĉi estas la homa difekto! Alies senton oni devas juĝi per sia propra, ĉiam introspektante,* ĉar la fizika korpo estas la enkarniĝo de egoismaj deziroj. Ofte okazas ke ĉiuj aliaj homoj ŝajnas pli feliĉaj ol ni mem, aŭ eĉ ŝajnas ke ni solaj estas plej malfeliĉaj tamen tio devenas de nesufiĉa kono de la mondo; ni inklinas kompari nin ĉiam al pli altklasaj kunhomoj. Ni emas fariĝi ĵaluzaj kaj vengemaj kontraŭ aliuloj, tute ignorante nian propran difekton. Tia estas la rutino de la homa mondo sed ni devas kutimiĝi al introspektado,* antaŭ ĉio. En la mondo troviĝas grandaj kaj malgrandaj suferoj, ĉagrenoj kaj katastrofoj de plej diversaj formoj kaj ni devas ne malesperiĝi aŭ embarasiĝi pro bagatela sufero aŭ malsukceso: ni vi u la vivon en plena dankemo kaj ĝojo. Tiamaniere ni povos nin teni tute indulgemaj kaj toleremaj al alies agoj kaj ankaŭ observi

aliajn grandanime same kiel nin mem. Tion multe faciligas dikredo.

La homa naturo kutimas ignori observi grandskalan situacion katenite de mal-granda afero, sed ofte la «intereso» en la vera senco ne estas tiu, kiu estas videbla ĵus antaŭ la nazo. Kelkaj scienculoj disputas kverele eĉ pri unu aŭ du vortoj, kelkaj religiuloj rigardas ĉiujn alisektulojn kiel demonojn kaj certa servistino onidire intencis pendigi sin simple pro tio ke ŝi akcidente disrompis tason de sia mastro. Kiam ni juĝas tiujn aferojn el la vidpunkto de granda situacio, ni povas konkludi ke unu aŭ du vorteraroj estas nur bagatelaĵo, neniom gravas por la feliĉo de la homaro. Ne estas miraklo, se ne ĉiuj konvertiĝas al la sama eklezio, ĉar estas tiom da koroj, kaj ne estas danĝera katastrofo, eĉ se multekosta taso rompiĝis. Malgraŭ ĉio tamen por tiuj koncernataj personoj la suprediritaj aferoj neniel estas bagatelaj.

El tio ni povas konstati kian subtilan psikologian rolon ludas la homa mal-rezignacio. Estas do saĝe ke ni ne zorgu, nek ĉagreniĝu senĉese pri tio kio estas negrava observe el granda vidpunkto.

Naskiĝo anticipigas morton kaj la homo kiu naskiĝis tute nuda ne devas tro sopiri lukson, do estas bone ke ni vivu puran vivon kun grandanimo kaj trankvilo. Se ni ĉiam plendas kaj veas pri ĉio ajn en nia ĉiutaga vivo, ni pli kaj pli malproksimiĝas for de la favoro de niaj parencoj, ne parolante pri tiu de Dio. Se ni vivas gaje kaj ĝoje kun pura interno, estas certe ke la «sep feliĉ-dioj»* konkurence alportos al ni feliĉojn sinsekve.

Kiel ajn la mondo estu ĥaosa kaj mal-bela, se vi estas vere bonkarakteraj mi certigas al vi ke vi nature ricevos la respekton de la aliaj. Se vi havas vere praktikan talenton, baldaŭ la mondo vin rekonos kaj bezonos vin, eĉ se vi

* trovebla en Wüster: Sin ekzameni en penso

* vidu la titol-desegnaĵojn O.I. (majo) kaj la klarigojn pri ili dorsflanke.

restus silentaj. Ĉu ne estas fakto ke multaj estas suferantaj kaj restas ne rekonataj pro tio ke ili mem havas forigendajn difektojn?

MATERIALISTO

Lastatempe mi interparolis kun materialisma junulo. Kelkaj punktoj de materialismo kompreneble estas akcepteblaj laŭteorie, sed en sia bazo ĝi tute malsamas al nia ideo. Mi do lasis lin fini sian longan argumentadon kaj poste mi diris:

«Kiu havas dikredon, eĉ se ĝi estas iom superstiĉa, tiu havas animtrankvilecon kaj ju pli li profundigas sin en kredo, des pli li ekposedas en si animan trankvilon! Lia personeco pli kaj pli bonigas rimarkinde. Li plu ne scias plendi kaj en ĉio lia vidpunkto baziĝas sur optimismo. Ankaŭ en praktika agado li multe pli serioze laboras per ĉiuj siaj fortoj ol simpla materialisto kaj tial lia animo ripozas en trankvilo. Kvankam nekredanto, precipe materialisto ofte montros sin kvazaŭ ĉion scianta, tamen bedaŭrinde en lia interno ne estas trankvilo, eĉ li suferas interne. Tio estas, ĉar lia sinteno kontraŭas la Naturon kaj devojiĝas de ties lego...»

Ĉe tio ĉi la junulo kapjesis. Kion mi ĵus diris estas vera fakto nerefutebla. Ju pli materialisto pristudas teoriojn, des pli li perdiĝas en la labirinto de nekompreno. Kion li mem kredas racia, tio ne estas universale racia. Vatita vestaĵo estas komforta en la vintro, tamen sufokiga en la somero. Teorio unuparte vera ne estas aplikebla al ĉio.

Ĉiuokaze teorio estas konvena flekseblaĵo; ekzemple la cifero 2 sekvas laŭteorie, tamen la fakto estas ke inter du ciferoj kuŝas la kampo de eterna kalkulo, se oni konsideras duonon, kvaronon ktp. Teorio ne havas limon.

Oni neniel povos sukcesi sistemigante Dion; oni tutkomprenos Lin nur tiam kiam oni mem farigos Dio. Senliman teorion oni neniel povos kompreni ĝis kiam oni farigos mem senlima.

* * *

Patrino Amo

La infano kreskas dank' al la sindona amo de la patrino. La patrino kareso al la infano estas modelo de Dia kareso al la homaro. Se tia amo estas inter ĉiuj aferoj, kia estas inter patrino kaj infano, la mondo prezentigos per si mem kiel plej alta ĉielregno. La patrino kiu vere amas sian infanon zorgas lin eĉ riskante sian vivon. Dume la infano siaflanke ne scias pri tio kaj neniom sentas dankemon. Sed unu tagon kiam li forlasos sian hejmon, li profunde ekscios kiel dankinda estas lia patrino. Kiam li mem farigos patro, li komplete komprenos kiel zorgis lin liaj gepatroj. Same estas tre malmultaj kiuj sentas elkoran dankemon al Dio jam dum la surtera vivo, krom kelkaj specialaj esceptoj. Tamen unu fojon kiam ili eniras en la Spiritan Mondon ili ekscias kiel zorgeme Dio jam aranĝis ĉion dum ilia surtera vivo. Ili tiam ekscios ke neniu ekzistas krom Dio, kiu zorgas pri la homoj de la komenco kaj dum la Eterneco.

Se infano estas idiota aŭ kripla, des pli la patrino direktas sian atenton kun granda amo al li. Same Dio multe pli amas idiotojn kaj malbonulojn pro granda kompatemo. En la reala mondo ni ofte malakceptas tiujn, kiuj estas malamikaj, sed Dio tute ne.

Peko estas malpuraĵo aŭ fortega ĥemijaĵo, kiu venenas tiujn, kiuj ĝin tuŝas. Se ordinara homo traktas ĝin, li infektigos de veneno. Tial nur dank' al la sinofera savado de tiu, kiu toleras tiun venenon; ĉiu peko tute sendanĝere malaperos. La purigistoj de tiuj polvaĵoj estas nomataj Savantoj de la mondo kaj la ĉefo de la Savantoj estas la Mesio. La Mesio estas la plej amata de Dio. Dio sendas tiun Mesion sur la teron por ke li reaĉetu la pekon de la tuta homaro.

Feliĉa estas tiu, kiu povas introspekti, ĉar li scias sian propran malbelecon, malbonecon kaj malgrandecon kaj li scias klinigi antaŭ Dio.

Trad: T. Nakamura.

KOKORO



Lafcadio Hearn

(2)

Trad. M. Polo kaj N. Tuzuo

III¹

Ĝenerale parolante, ni konstruas definitive, la japanoj provizore. Malmultaj ordinaraĵoj en Japanujo estas faritaj kun konsidero pri daŭreco. La pajlaj sandaloj eluzitaj kaj anstataŭigataj je ĉiu stadio de vojaĝo; la kimono² konsistanta el kelkaj simplaj larĝecoj malforte kunkudritaj por la uzado, kaj denove malkudrataj por lavado; la novaj mangbastonetoj prezentataj al ĉiu gasto en hoteloj; la malpezaj paneloj «ŝooji» samtempe uzataj kiel fenestro kaj muro, kaj reprovizataj per papero dufoje jare; la matoj renovigataj ĉiun aŭtunon,³ — ĉi ĉio estas nur hazardaj ekzemploj pri nekalkuleblaj malgrandaĵoj en la ĉiutaga vivo, kiuj ilustras la nacian kontentigon pri provizoreco.

Kia estas la historio de ordinara japana loĝdomo? Forlasante mian domon matene, mi observas pasante la sekvan stratangulon, kelkajn virojn starigantaj bambufostojn sur vaka tereno. Revenante post kvin-hora foresto, mi trovas sur la sama tereno la skeleton de du-etaĝa loĝdomo. La sekvan matenon mi vidas, ke la muroj estas preskaŭ finitaj, — koto kaj bambuplektaĵoj. Je sunsubiro la tegmento estas komplete tegolita. La venintan matenon mi rimarkas ke oni fiksas la matojn kaj la internan paneladon. La tuta konstruado daŭris nur kvin tagojn. Tiu ĉi estas, kompreneble, malkara domo; eleganta konstruaĵo postulus pli longan tempon por esti starigita kaj finita. Sed japanaj urboj estas plejparte kunmetitaj el tiaj ordinaraĵoj. Ili

estas tiel malkaraj kiel simplaj.⁴

Mi ne plu povas memori kie mi trovis por la unua fojo la rimarkon ke la kurbo de l' ĉina tegmento eventuale konservas la memoron pri la nomada tendo. La ideo posedis min longe post kiam mi maldankeme forgesis la libron en kiu mi trovis ĝin; kaj kiam mi unue vidis, en Izumo, la karakterizan strukturon de l' antikvaj ŝinto-⁵ sanktejoj, kun strangaj krucigitaj elstaraĵoj ĉe la fino de l' frontono kaj sur la tegmenta firsto, la sugesto de l' forgesita eseisto⁶ pri la ebla origino de multe malpli antikvaj formoj revenis al mi kun granda forto. Sed krom la primitivaj arkitekturaj tradicioj estas multo en Japanujo kiu montras nomadan originon de la raso. Ĉiam kaj ĉie ni konstatas foreston de ĉio kion ni nomas solideco; kaj la karakterizo de provizoreco ŝajne markas ĉion en la ekstera vivo de l' popolo, escepte, verdire, la antikvan kostumaron de l' kamparanoj kaj la formon de iliaj laboriloj. Ne konsiderante la fakton ke eĉ dum la kompare mallonga periodo de l' skribita historio Japanujo havis pli ol sesdek ĉefurbojn, el kiuj la plej multaj jam malaperis, ni povas ĝenerale rimarkigi ke ĉiu japana urbo estas rekonstruata en la daŭro de unu generacio. Kelkaj temploj kaj iuj kolosaj fortikaĵoj estas esceptoj; sed ĝenerale parolante, japana urbo

4) Nuntempe en ĉiuj urboj troviĝas modernaj kaj masivaj konstruaĵoj el ferbetono, same kiel en Eŭropo kaj Ameriko — sed la familioj preferas vivi en japanaj propraj dometoj, kiuj vere estas tiaj kiel L. Hearn priskribas ĉi-supre. La modernigo de Japanujo nur malmulte koncernas la vivmanieron de l' popolo. Japanaj domoj unuavide estas primitivaj sed eŭropaj kavernecaj ŝton-masonaĵoj ankaŭ estas kritikindaj — kaj la japanaj arkitekturaj principoj pli kaj pli estas imitataj en nia tempo en la Okcidento pro ilia simpleco kaj arta karaktero.

5) nomo de la japana nacia religio, kies ĉefo estas la Imperiestro mem.

6) eseo — «studajo» (Wüster)

1) II (forlasita) estas poezia priskribo de iu amerika grandurbo.

2) mankas en P.V. sed trovebla en Wüster.

3) ĉe riĉuloj; ĝenerale oni nur purigas ilin.

ŝanĝas la substancon, se ne la formojn, en la vivdaŭro de unu homo. Brulegoj, tertremoj, kaj multaj aliaj kaŭzoj parte klarigas tion ĉi; la ĉefa kialo, tamen estas ke la domoj ne estas konstruataj por daŭri. La ordinaruloj ne havas prapatran hejmon. La plej kara loko por ĉiu estas ne la loko de l' naskiĝo sed tiu de l' enterigo; kaj estas malmulto kio estas definitiva krom la ripozejo de l' mortintoj kaj la ĉirkaŭaĵo de l' antikvaj sanktejoj.

La lando mem estas lando de malkonstanto. Riveroj ŝanĝas sian fluon, marbordoj sian figuron, ebenoj sian nivelon; vulkanaj pintoj altiĝas aŭ kolapsas; valoj estas barataj de lafo-elfluo kaj terglitoj, lagoj aperas kaj malaperas. Eĉ la senkompara formo de l' monto Fuji, tiu neĝkovrata miraklo kiu inspiradis artistojn dum jarcentoj, ŝanĝiĝis iomete laŭ onidiro de mia alveno en la lando; kaj ne malmultaj aliaj montegoj alprenis en mallonga tempo tute novan formon. Nur la ĝenerala figuro de la lando, la ĝenerala aspekto de ĝia naturo, la ĝenerala karakterizo de l' sezonoj, estas fiksjaj. Eĉ la beleco de l' pejzaĝoj estas grandparte iluzia, — beleco de ŝanĝemaj koloroj kaj vagantaj nebuloj. Nur tiu, al kiu tiuj pejzaĝoj estas familiaraj, socias kiel iliaj montaj vaporoj mokas la verajn ŝanĝojn, en la historio de l' arkipelago.

La dioj, verdire, restas, — posedas la hejmojn sur montetoj, disradias molan religiecan timon tra la aŭroro el siaj boskoj, eble ĉar ili estas sen formoj kaj substanco. Iliaj sanktejoj malforte estas tute neglektataj, simile al homaj loĝejoj. Sed ĉiu ŝintosanktejo estas necese rekonstruata en pli-malpli longa intervalo; kaj la plej sankta, — la sanktejo en Ise, — obee al praantikva kutimo, devas esti malkonstruata ĉiun dudekan jaron, kaj ĝiaj lignaĵoj tranĉitaj en milojn da etaj amuletoj, kiuj estas disdonataj al pilgrimantoj.

IV 7

Estas interese ekzameni, ĉu estas iu kompensa valoro al tiu ĉi malkonstanteco

7) la fino de III (forlasita) temas pri la paciencemo de l' japanoj, kiun la aŭtoro kredas origini el budhismo.

kaj malgrandeco de l' nacia vivo.

Nenio pli karakterizas tiun vivon ol ĝia ekstrema fluideco. La japana popolo prezentas medion kies eroj estas konstante moviĝantaj.⁸

... En iu senco amerikanoj prave konsideras sin grandaj vojaĝantoj. En alia, ili certe malpravas; la ordinarulo, en Ameriko, ne povas esti komparata, kiel vojaĝanto, al la simpla japano. Kaj nature, konsiderante la relativan moviĝemon de l' popolo, oni devas konsideri antaŭ ĉio la grandajn amasojn, la laboristojn, — ne nur la malvastan rondon de l' riĉuloj. En sia propra lando, la japanoj estas la plej grandaj vojaĝantoj inter ĉiuj civilizitaj popoloj. Ili estas la plej grandaj vojaĝantoj ĉar, eĉ en lando konsistanta ĉefe el monto-ĉenoj, ili konas neniun obstaklon al vojaĝo. La japano, kiu plej multe vojaĝas ne estas kiu bezonas fervojon kaj vaporsipon.

Ĉe ni, la ordinara laboristo estas nekompareble malpli libera ol la ordinara laboristo japana. Li estas malpli libera pro la pli komplikita mekanismo de okcidentaj socioj, kies fortoj tendencas al aglomero kaj solida integriĝo. ... Li estas malpli libera ĉar li devas vivi laŭ normo kiu malbligas por li konkeri financan sendependecon per nura ŝparado. Por akiri tian sendependecon, li devas posedi esceptan karakteron kaj esceptajn kapablojn, pli grandajn ol tiuj de miloj da esceptaj konkurantoj, egale deziremaj fugi el la sama sklaveco. Mallonge, konsekvence, li estas malpli sendependa ĉar la speciala karaktero de lia civilizo lamigas lian naturan povon vivi sen helpo de maŝinoj aŭ granda kapitalo. Vivi tiel nenature signifas perdi, pli-malpli frue, la povon de sendependa movo. Antaŭ ol okcidentano povas foriri, li devas konsideri multajn aferojn. Antaŭ ol japano foriras, li havas neniajn pripensindaĵojn. Li simple forlasas la lokon, kiun li malŝatas, kaj iras al la loko, kiun li aspiras, senĝene. Nenio malhelpas lin.⁹

8) la forlasita alineo estas ne-esenca por la komparo de la sekva paragrafo.

9) Kun la industriigo de Japanujo, kompreneble japanoj ankaŭ perdis multon el sia antaŭa libereco; tamen, ili ankaŭ retenis multon, tiel ke ili restas ankoraŭ multe pli liberaj ol la okcidentanoj apartenantaj al la respektivaj socitavoloj.

Malriĉeco ne estas obstaklo, sed stimulo. Malhelpojn li ne havas, aŭ nur tiajn kiaj estas forigeblaj en kelkaj minutoj. Distancoj ne timigas lin. La Naturo donis al li perfektajn piedojn kiuj kapablas porti lin tra kvindek mejloj tage sen peno; stomakon kies ĥemio povas ĉerpi abundan nutraĵon el manĝaĵoj per kiuj neniu eŭropano povus vivi;¹⁰ kaj korpon kiu malestimas varmegon, malvarmon kaj malsekecon tute same, ĉar ankoraŭ nedifektita per malsanigaj vestaĵoj, per senutila komforto, per la kutimo ĉerpi varmon ĉe fajrujoj kaj per la kutimo portadi ledajn ŝuojn.

Ŝajnas al mi, ke la karaktero de niaj¹¹ piedvestoj signifas pli ol oni kutime supozas. La piedvestoj prezentas en si mem malhelpon al individua libereco. Tio estas vera el la vidpunkto de multekosteco sed ankoraŭ multe pli laŭ la formo. Ili diformigis la okcidentajn piedojn, kaj igis ilin nekapablaj por la normala laboro. La fizikaj rezultoj ne nur limiĝas al la piedoj mem. Kio malhelpas, rekte aŭ pere, la organojn de l' movo, necese influas la tutan fizikan organismon. Ĉu la malbono haltas tie? Eble ni submetigas al la plej absurdaj kondiĉoj kiuj iam ekzistis en iu ajn civilizo ĉar ni tro longe submetigis al la tiraneco de l' ŝuistoj. Verŝajne estas difektoj en nia politika sistemo, en nia socia etiko, en nia religia sistemo, pli-malpli rilatigeblaj al la kutimo portadi ledajn ŝuojn. Submetiĝo al la korpo certe helpas la akceptigon pri kunpremado al la menso.¹²

La ordinara japano — la kvalifikita laboristo kapabla konkurenci sen peno iun ajn okcidentan metiiston en la koncerna industri-fako — estas feliĉe sendependa de ambaŭ ŝuistoj kaj tajloroj. Liaj piedoj estas belaspektaj, lia korpo sana, kaj lia

koro libera. Se li deziras vojaĝi milon da mejloj, li povas pretiĝi en kvin minutoj. Lia tuta ekipaĵo ne kostas unu dolaron; kaj liaj pakaĵoj povas esti portataj en unu poŝtuko. Per modesta sumo li povas vojaĝadi dum la tuta jaro senlabore, aŭ li povas vojaĝi laboranta tie kaj tie, aŭ li povas veturi kiel pilgrimanto. Iu povus respondi ke ĉiu sovaĝulo povas fari la saman aferon. Certe, sed iu ajn civilizita homo ne povas; kaj la japanoj estas civilizitaj de almenaŭ mil jaroj. Konsekvence, ili estas kapablaj minaci okcidentajn industriistojn.

Ni al kutimiĝis tro multe asocii tiun ĉi specon de sendependa moviĝemo kun la vivo de niaj propraj almozuloj kaj vagabondoj¹³ kaj ni ne plu havas ian ĝustan koncepton pri ĝia interna senco.

Ni ankaŭ pensis pri ĝi konekse kun malagrablajoj, — malpureco kaj malagrablaj odoroj. Sed, kiel profesoro Chamberlain¹⁴ prave diris, «japana popolamaso estas la plej ĝentila en la mondo.» La japana vagabondo prenas sian ĉiutagan varman banon, se li posedas frakcion da cendo por pagi la koston,¹⁵ aŭ malvarman banon, se li ne havas monon. En lia eta lig-pakaĵo¹⁶ troviĝas kombilo, dentlignetoj, razilo, dentbroso. Li neniam permesas ke li fariĝu malagrabla por aliaj. Atinginta sian celon, li povas transformiĝi en vizitanton kun tre belaj manieroj kaj sendifekta, kvankam simpla vestaĵo.

Kapableco vivi sen mebloj, sen malhelpoj, kun la kiel eble plej malgranda kvanto da puraj vestaĵoj, montras pli ol la avantaĝon posedatan de tiu ĉi japana raso en la batalo de l' vivo; tio montras ankaŭ la veran naturon de kelkaj difektoj en nia propra civilizo. Tio devigas nin pripensi la senbezonan multecon de niaj ĉiutagaj bezonoj. Ni devas havi viandon kaj panon; vitrajn fenestrojn kaj fornon; ĉapelojn, ĉe-

10) unu el la tradukantoj de tiu ĉi verko estas sendube escepto!

11) estas senutile rimarkigi, ke «ni» rilatas al okcidentanoj.

12) japanoj ordinare ne portas ŝuojn sed specialajn pantoflojn (zori) aŭ lignosandalojn (geta); ili fiksiĝas per fadeno (ito) enkroĉita inter la dika kaj la ceteraj fingroj de l' piedo. Tiu ĉi maniero estas ekonomia kaj praktika, ĉar antaŭ ol eniri domon, oni devas forigi la piedvestojn.

13) mankas en la P.V. sed tre ĝenerale akceptita neologismo (=vagulo).

14) de la Imperia Universitato, Tokio — fama aŭtoritato pri aferoj japanaj.

15) kaj tio estas vera eĉ hodiaŭ, kiam la «yen» perdis el sia valoro...

16) laŭ japana maniero oni portas necesajn aĵojn kunligitajn en tuko (furosiki).

mizojn, kaj lanajn subvestaĵojn; botojn kaj suojn; valizojn, vojaĝpoŝojn kaj skatolojn; litojn, matracojn, littukojn kaj kovrilojn — kiujn la japanoj povas ĉiujn malhavi, kaj verdire fartas pli bone sen ili. Nur pri-pensu iomete kiom grava artiklo por okcidentano estas la ĉemizo! Tamen eĉ la plej simpla ĉemizo estas en si mem senbezona vestaĵo. Ĝi donas nek varmon nek komforton. Ĝi prezentas laŭ nia modo la

postvivon de io, kio estis iam luksa klasdistingilo, sed hodiaŭ sensignifa kaj senutila same kiel la butonoj kudritaj sur la ekstero de niaj jakmanikoj.¹⁷

17) Tridek jarojn post la apero de la supra alineo, t.e. nuntempe, la japanaj urbanoj grandparte posedas du vestaĵaron: eŭropan por laboro kaj japanan por ripozo. La kamparanaro konservis ekskluzive la antikvajn naciajn kimonojn. (kimono—vidu en Wüster).

ORIENTA FILOZOFIO

«La okcidentaj filozofioj perdigas la harojn, mallougigas la vivon.
La orientaj filozofioj kreskigas la harojn, kaj longigas la vivon.»

Henri Michaux (*Nouvelle Revue Française*, p. 721/1932)

El la Etiko de L A O - Ĉ E

Traduko kaj komentario de J. Major kaj T. Nakamura

Ĉapitro XXIV Tiu kiu staras sur siaj piedfingroj ne staras firme; kiu streĉas siajn gambojn, ne marŝas *nature*. Simile, tiu kiu altrudas sin, ne brilas; kiu asertas siajn proprajn vidpunktojn ne estas eminenta; tiu kiu flatas sin ne trovas aprobon por siaj meritoj; kiu estas memfidema ne meritas superecon. Tiaj kondiĉoj, rigardataj el la vidpunkto de *Tao*, estas similaj al manganĝ-restaĵoj, aŭ al tumoroj sur la korpo, malŝatata de ĉiuj. Konsekvence, tiuj kiuj praktikadas la instruojn de *Tao* ne alprenas kaj ne allasas ilin.

XXIV § 1 Antaŭ la estigo de l' Ĉielo kaj de l' Tero ekzistis io nedifinita kaj kompleta. Kiel silenta ĝi estis, soleca, senforma, sensanga, ĉiomampleksa kaj neelĉerpbla! Ĝi povas esti agnoskata kiel la Patrino de ĉio.

§ 2 Mi ne scias ĝian nomon, kaj mi donas al ĝi la difinon de *Tao*, la Vojo de l' Evoluo. Farante plian provon ĝin difini mi nomas ĝin La Granda.

§ 3 Granda ĝi estas, kaj ĝi konstante

movigas. Movigante, ĝi iĝas fora. Foriĝinte, ĝi revenas.* Tial *Tao* estas granda; la Ĉielo estas granda; la Tero estas granda; kaj la saĝa reganto estas ankaŭ granda. En la universo estas kvar grandaĵoj, kaj la saĝa reĝo estas unu el ili.

§ 4 La homo prenas siajn leĝojn de l' Tero; la Tero prenas siajn leĝojn de l' Ĉielo; la Ĉielo prenas siajn leĝojn de *Tao*. La leĝoj de *Tao* konsistas en tio ke ĝi estas kio ĝi estas.

* t.e. *Tao* estas ĉie

Tiu ĉi ĉapitro klopodas difini *Tao*, kiu aperas kiel la origina kaŭzo, aŭ Dio. La ideografajo de *Tao* estas 道 (japane legata *miĉi* kaj signifas *vojo*) sed oni ne povas kontentigi pri tia simpla klariĝo. *Tao* estas malfacile kaptebla koncepto, ĝi eĉ similas la «kreatan evoluon» de Bergson, familiaran en moderna filozofio. Notinda estas la ideo de Lao-ĉe pri la hierarkio de homo (=administranto de l' Tero) kaj Dio (administranto de l' Ĉielo) — idearo familiara en Oomoto, ktp.

XXIV § 1 Gravitado estas la bazo de malpezeco; ripozo estas la reganto de l'

movo.

§ 2 Tial la saĝa princo, marŝanta la tutan tagon, ne foriĝas de siaj pakaĵ-veturiloj. Eĉ se li havas bonegan planon por ĉirkaŭrigardo, li trankvile restas *en sia propra loko*, indiferente. Kial la mastro de multegaj ĉaroj antaŭirus senkonsidere pri sia regno? Se li agas tiel, li perdas sian bazon de gravitado; se li moviĝas aktive, li perdas sian tronon.

Estus eraro serĉi en tiuj ĉi pensoj simplan klarigon pri la ĉina konservativismo. La fundamenta ideo estas, ke ni devas eviti facilanimecon kaj tro rapidan agadon. Precipe meze de l' politika romantikismo observebla en nia epoko, la homoj devus aŭskulti la voĉon de l' antikva saĝulo.

XXVII § 1 Lerta vojaĝanto ne postlasas signojn de radoj aŭ piedoj; lerta oratoro diras nenion censureblan aŭ riproĉeblan; lerta kalkulisto ne uzas entranĉaron*; lerta fermanto ne bezonas boltojn kaj riglilojn, kaj tamen estas neeble malfermi kion li fermis; lerta bindisto ne uzas fadenojn kaj nodojn; kaj tamen estas neeble malligi kion li ligis. Tute same la saĝulo estas ĉiam lerta en homsavado kaj li ne forpuŝas iun ajn homon; li estas ĉiam lerta en ŝparado, kaj li nenion forĵetas. Tio ĉi estas nomata «Kaŝi la lumon de sia procedo».

2 Konsekvence, la lertulo estas mastro admirenda de tiu kiu ne posedas lertecon; kaj tiu kiu ne posedas lertecon estas la helpanto de la *reputacio de tiu* kiu estas lerta. Se unu ne honorus sian majstron, kaj la alia ne ĝojus pro la helpo ricevata, iu *observanto*, kvankam inteligenta, povus grave erari pri ili. Tio ĉi estas nomata «La plej alta grado de mistero.»

* traduko de l' angla vorto «tallies» (laŭ Rhodes): entranĉitaj lignopecoj por servi kiel negoca dokumento (ambaŭ komercantoj konservas la duonon), kredeble aludo al la primitiva librotrenado de antikva Ĉinujo.

XXIX 1 Se iu dezirus akiri la regnon por si mem, kaj efektiviĝi ĉi tion per sia agado, mi asertas ke li malsukcesos. Regno estas ju spiriteca aĵo, kaj ne povas esti

akirita pere de aktiva agado. Kiu dezirus ĝin akiri tiamaniere, nur detruus ĝin; kiu volus ĝin firmteni, perdis ĝin.

2 Tia estas la mond-stato
Ke l' antaŭo iras en fonon;
Varmo fariĝas frosto.
Forto konsistas en cedo;
Domo ruinigita mokas laboron.

Konsekvence, la saĝulo evitas egan forto-streĉon, senprudenton, kaj facilan indulgon.

La ideo ke ĉio kio estas farata perforte certe malsukcesos, estas ja aksiomo de moderna psikologio. Coué diris, ke kiam volo kaj imago estas en konflikto, la lasta ĉiam venkas. La malfacileco de l' naturfenomenoj laŭ la nuntempa fiziko (estas nur probableco, ne certeco!), montras ankaŭ ke la moderna scienco pli kaj pli revenas al la antikvaj tradicioj de pensado. — Sed la vera senco de l' jusa paragrafo estas, ke Tao malpermesas agadon pro persona, t.e. egoisma motivo: tia agado nepre malsukcesos. Tiu ĉi ideo estas la fundamenta penso de Lao-ĉe, ofte revenante en diversaj formoj — ĝi estas ankaŭ la bazo de ĉiu spiritualisma filozofio.



Monto Cook, Suda Alpoj, Novzelando,

Kelkaj klarigoj pri la Rakontoj el la Spirita Mondo

La *Rakontoj* estas unika Verkaro en la tutmonda literaturo. La tuto konsistos el 120 volumoj, el kiuj 75 jam aperis. Ĉiuj estas la diktaĵo de majstro Onisabro Deguĉi, ĉefo de Oomoto Movado. Temas pri *inspirita diktado* kiu estas intuicia kaj rapida, sendependa de helplibroj, redaktado, ktp. La diktanto estas la Dia Voĉo, la korpo de l' profeto estas nur perilo. La menciitaj volumoj estas diktataj en la daŭro de malpli ol unu jaro — kio estas eksterordinara kvanto, se ni konsideras la profundecon de l' enhavo kaj la mirindan variecon de l' temoj traktataj.

En nia broŝuro «Kio estas Oomoto?» (nova eldono aperos baldaŭ) ni detale priskribis la verkmanieron kaj la enhavon de l' Verkaro. Oni havos iom da ideo pri la diktmaniero konsultante la tiurilatan fotografaĵon. Diversaj tradukaĵoj el la Rakontoj aperis jam en la antaŭa «Oomoto» (ankaŭ en «Oomoto Internacia», pariza serio) — parto el tiuj numeroj estas ankoraŭ mendebla.

Ĉi tie ni sekvigas tradukon el tre diskutita teksto de la 4a volumo de l' Rakontoj el la Spirita Mondo. Temas pri la Kosmologio de Oomoto. Ni avertas la legantojn, ke ne ĉiu parto de tiu ĉi koincidas al la asertoj de l' moderna astronomio. Majstro Deguĉi ja mem avertas pri tio komence de paragrafo (II) — kiel oni legos. Kosmologiaj sistemoj ofte ŝanĝiĝis dum la daŭro de l' kulturhistorio.

La antikvaj grekoj kredis, ke la tero estas telerforma plataĵo, kiu naĝas en la senfina oceano. Estas iugrade simila aserto en la teksto — tamen ni ne povas konsenti, ke la instruo de majstro Deguĉi estas regreso. Kontraŭe ni kredas, ke iom post iom, kun la ŝanĝigo kaj evoluo de la scienco, la astronomiaj instruoj koincidos kun la revelaci de Dio, esprimita en la Rakontoj pere de Onisabro Deguĉi. Tia procedo jam nun daŭras, ĉar dum la lastaj jaroj la scienca mondkompreno multe ŝanĝiĝis en direkton konforman al Oomoto (Relativeco, ktp.)

Cetere neniu senpartia persono povas serioze pretendi, ke teologio devas esti konforma al la scienco. Multaj punktoj en la diversreligiaj doktrinoj kontraŭdiras la tezojn de l' nuntempa scienco. Scienco okupiĝas pri materiaj aĵoj kaj lasas sen atento Dion kaj spiritajn fenomenojn (krom la nove naskiĝinta «meta-psikismo»). Oni do ankaŭ ne postulu, ke Oomoto-doktrino estu pala kopio de popularaj sciencaj lernolibroj, nek vulgarigo de malfacilaj matematikaj teorioj. Legante la Rakontojn el la Spirita Mondo — kiel la titolo klare montras: temas pri profetaĵo, revelacio, artista vizio, poezio... Oni do legu tiun ĉi literaturon kun larĝa menso, sen antaŭjuĝa, libera, altfluga spirito — same kiel ĝi estis verkata de majstro Onisabro DEGUĈI.

(Redakcio)

LA UNIVERSO DE DIO REVELACIITA

ONISABRO DEGUĈI

Diktita la 15an de Decembro 1921 en Kameoka. Tradukis Koogecu Niŝimura.

(I)

TIO kion ni vidas ĉirkaŭ ni, kaj kion la astronomoj nomas «Suna Sistemo», estas la malgranda universo. La Granda Universo, konsistas, laŭ la dia revelacio, el 5.670.000.000 da tiaj malgrandaj universoj. Do, «Granda Universo» estas la nomo

de tiu ĉi universala tutaĵo. La Dio kiu kreis kaj kompletigis la spiritan mondon de la malgranda universo, kies loĝantoj ni estas, nomiĝas Kunitokotaĉi-no-Mikoto¹

¹ mikoto=dio, no=genitivo «de»: ĝentila sufikso por dioj.

(kio signifas «Dio reganta universon»), kaj la Dio, kiu regas la Grandan Universon nomigas Ookunitokotaĉi-no-Mikoto. La du plej grandaj partoj de la Malgranda Universo estas la Granda Ĉielo kaj la Granda Tero. Ili ambaŭ havas la saman dikecon, t. e. 11.340.000.000 kilometroj. En la ĉielo la suno kaj multaj steloj estas situataj. Inter la Granda Ĉielo kaj la Granda Tero estas, la mezĉielo, kie staras la luno, la polusstelo, la sep steloj de la granda urso kaj la tri steloj de Orion-stelaro. En la Granda Tero troviĝas nia tero kaj la tera luno, la teraj steloj, kies nombro estas egala al tiu de la ĉielaj steloj. La steloj en la Granda Ĉielo estas nomataj Hoŝi (fajra akvo) kaj tiuj en la Granda Tero nomigas Ŝiho (akva fajro). La steloj en la Granda Ĉielo ĉiuj havas sian propran lumon kaj la formon de ●—● (haltero). La plej alta parto de la Granda Tero (kiu konsistas en glaciaj montoj) kaj la plej densa parto de la Granda Ĉielo sin tuŝas. Generale la Granda Ĉielo estas klara kaj malpeza; la Granda Tero estas malklara kaj peza. En la centro de la Granda Ĉielo kristaliĝas la suno, kies amplekso estas preskaŭ $\frac{1}{4}$.500.000 parto de la Granda Ĉielo. Nia tero estas (analogie)... $\frac{1}{4}$.500.000 parto de la Granda Tero. Malantaŭ la suno troviĝas samforma akva globo kiu kun la suno donas la formon ●—●. Tiu ĉi akva globo sendas la necesan kvanton da akvo al la suno kaj tiamaniere bruligas kaj lumigas ĝin, kiu en si mem estas malluma. Tial la lumo de la suno ne estas tiom ruĝa, kiom tiu de la ordinara fajro. Ĝi havas palan koloron ĉar la blankeco de la fajro estas kaŭzata de la akvaĵo de la globo. Tiamaniere la suno havas siajn en-kaj-el-spirojn pendante en la centro de la Granda Ĉielo de la malgranda universo. La tero (kiu laŭ la dia instruo ne estas perfekta globo sed pli plata ol globa) estas kovrita de akvo, tri-kvarone. La koloro de la akvo estas blanka. Sub la Granda Tero estas fajra globo, kiu havas preskaŭ la saman grandecon, kiel nia tero. Tiu fajra globo donas varmon al la tero, donas al ĝi lumon, kaj reguligas ĝiajn enspirojn kaj elspirojn.

La suno, per sia spira funkciado okazigas en-kaj-elspiradon, klinigante aŭtomate. Sed la pozicio de la suno estas en la centro de la Granda Ĉielo kaj ne moviĝas.


Nia tero estas en la centro de la surfaco de la Granda Tero kaj aŭtomate klinigadas kun ĝi. Laŭ la grado de la kliniĝo estiĝas tago kaj nokto, same kiel printempo, somero, aŭtuno kaj vintro.

La malgranda aŭtomata kliniĝo sin ripetas ĉiutage kaj la granda aŭtomata kliniĝo okazas tra la kvar sezonoj. Ekvinokso estiĝas, kiam koincidas la aŭtomata kliniĝo de la suno kun la pli granda kliniĝo de la tero. Post ĉiuj 60 jaroj, kaj post ĉiuj 360 jaroj okazas multe pli-grandaj kliniĝoj. Tiam okazas gravaj ŝanĝoj sur la Granda kaj malgranda Teroj.

La suno ŝajnas eliri el oriento kaj subiri okcidenten, sed laŭ dia vidpunkto la suno kaj la tero ambaŭ neniam ŝanĝas sian pozicion. Kiel ni aludis antaŭe, ili faras nur aŭtomatajn kliniĝojn. Kiel en la Granda Ĉielo troviĝas Marso, Merkuro, Jupitero, Venuso, Saturno, Uranuso kaj Neptuno² kaj aliaj sennombraj steloj — tiel estas en la Granda Tero, samnombraj kaj samformaj «akvaj steloj». Ambaŭ steloj en la Granda Ĉielo kaj en la Granda Tero formas figuron ●—● (Simile al la suno kaj la tero). Ili havas sian propran lumon (la steloj en la Granda Ĉielo kaj Granda Tero) kaj la nombro de la mallumaj steloj estas centoble pli granda ol tiu de la lumaj steloj.

La luno pendas inter la Granda Ĉielo kaj la Granda Tero, t. e. en la meza ĉielo kaj havas la saman amplekson, kiel la suno kaj ĉirkaŭiras ĉiam la saman orbiton, por harmoniigi la akvecon de la universo, ne permesante al la suno tro varmiĝi nek al la tero tro malvarmiĝi. La formo de la luno estas globa; la duona parto konsistas el akvo kaj havas sian propran lumon. La alia duono konsistas el fajro. Dum sia turnado la luno, ĉu sendas akvon al la tero, ĉu elsorbas ĝin per la tera luno.

² Ĉiuj mankas en la P.V., — ĉiuj Zamenhofajl.



- | | | |
|---------------------|-----------------|-------------------------|
| 1. Granda Ĉielo. | 2. Granda Tero. | 3. la suno. |
| 4. akva globo. | 5. la luno. | 6. supra vojo. |
| 7. malsupra vojo. | 8. orbito. | 9. ĉiela stelo. |
| 10. glaciaj montoj. | 11. nia tero. | 12. fajra globo. |
| 13. tera luno. | 14. tera stelo. | 15. Grand-Granda Ĉielo. |

Tiel okazas la fenomeno de plena aŭ malplena tajdo. En Oomoto Sankta Skribo estas jena frazo: «La Granda Dio de la Luno estas la prapatro de tiu ĉi reala mondo.» Tio signifas ke Li harmoniigas fajrecon kaj akvecon, kiuj estas la el- kaj enspiradoj de la Granda Ĉielo kaj la Granda Tero. La fajra globo kiu troviĝas sub la Granda Tero okazigas la elspiradon kaj la tera luno la enspiradon. En la sama sankta skribaĵo troviĝas plano de Fuji kaj Naruto.³ Laŭ tiu ĉi plano, Fujisan estas la elirejo de la fajra bulo kaj Naruto estas la enirejo, tra kiu la tera luno ensorbas la akvon de la tero. Kiel la homa korpo havas multajn arteriojn kaj nervojn tiel la fajra globo kaj la tera luno havas multajn komunikilojn en ĉiuj direktoj kaj komunikigas kun la supraĵo de nia tero.

* * *

Mia nuna rakonto pri la Universa Konstruo estas de Dio donita kaj mi ne havas respondecon, se ĝi ne koincidas kun la

³ Fuji — estas monto en Japanujo; Naruto — mirinda mara akvoturno proksima al Osaka. Fujisan: japanoj ne uzas Fuji-jama, kvankam yama=monto.

teorioj de la moderna astronomio. Depost kiam mi ricevis dian instruon dum 24 jaroj, mi ne estis en kontakto kun la ĉiuspecaj verkoj aperintaj en la tuta mondo kaj tial mi ne scias, kiom progresis la astronomio. Se oni rigardus mian verkon pri la universo tra la okulvitroj de la nuntempa eŭropa scienco, oni eble trovos multajn punktojn neakcepteblajn. Nun, kiel daŭrigo de l' antaŭa ĉapitro, mi parolos pri la suno.

En si mem, la suno estas korpo malluma. Ĝi aspektas blankruĝa pro la brilo de la akvaĵo entenata. En malluma nokto la blanka materio estas pli facile videbla ol la ruĝa. Tio pravas ke la origino de la suna brilo estas la akvaĵo.

La malgrandaj universoj de la Granda Universo altiras reciproke unu la alian. La relative senmova stato de la suno estas konsekvenco de tiu ĉi reciproka altirado de la steloj. Tial Dio unue kreis la stelojn por tenadi la sunon. La distanco inter la suno kaj nia (malgranda) tero estas $\frac{1}{4}$ de la diametro de la malgranda universo, kiu estas 22.680.000.000 km. Ĉiuj steloj de la Granda Ĉielo, situataj pli alte ol la suno, forsendas sian propran lumon. La suno ne forsendas sian lumon al la Granda Ĉielo, sed sendas ĝin ĉiam al la Granda Tero, kiel reflektilo. Ni generale parolas pri Oriento kaj Okcidento: en Oriento la suno levigas kaj en Okcidento ĝi subiras. El universa vidpunkto la kvar monddirektoj ne ekzistas. Budho diras: «Oriento kaj Okcidento ne ekzistas. Kie do povas esti Sudo kaj Nordo?» Budho esprimis tiun ĉi penson, ĉar li rigardis la mondon el universa vidpunkto. Se ni volas diferencigi tiujn direktojn, ni devas preni la nordan poluson kiel centron. Japane nordo estas *Kita*, kio signifas spirit-plenecon; tiu ĉi vorto signifas ankaŭ plenigon de fajreco kaj akveco, kaj ankaŭ de en-kaj elspirado. Japana sudo estas *Minami*, kio signifas: «ĉio videbla».

Nia tero, kiel mi jam diris, ne estas globo, sed plata (malalta) kvazaŭ hemisfero kaj similas al renversita telero. Ĝi konsistigas tre malgrandan parton de la Granda

Tero, en kies centro ĝi troviĝas. La Granda Tero estas kovrita de glaciaj montoj, kiuj estas des pli krutaj kaj altaj, ju pli ili troviĝas malproksime de nia tero. Degelas nur tiuj glacimontoj, kiuj estas plej proksimaj al nia tero.

Kiel unu el la atestaĵoj, ke nia malgranda tero estas globa, oni donas fakton, ke ju pli malproksimiĝas ŝipo sur la maro, des pli ĝi kaŝiĝas de la malsupra parto. Tamen tio estas pro tio ke niaj okuloj mem havas globan formon. Homoj povas vidi malproksimen dank' al siaj okulaj lensoj kiuj funkcias kiel konkavaj lensoj de teleskopo. Tiuj kiuj insistas, ke nia tero estas globa, unue devas studi la strukturon de siaj okuloj.

Nia tero ha as ankaŭ sian propran lumon, do ĝi ne estas aĵo malluma. Tio kio havas plej grandan rolon en la tuta universo, estas la luno. Ĉiuj scias ke la naturo kreskas kaj evoluas per la favoro de la suno; sed oni apenaŭ komprenas la senliman kaŝitan favoron de la luno. Ĉio en la universo havas gravan kaj delikatan rilaton al la rivoluado de la luno, kiu ĉirkaŭiras la mezan ĉielon dum iom pli ol 29 tagoj t.e. unu monato. Ĝi ne rivoluadas aŭtomate, sed nur simple moviĝas, ne turniĝante ĉirkaŭ si mem. La ŝanĝo de ĝia pozicio en la ĉielo laŭ la tagoj de la monato, montras ke ĝi ne estas senmova, sed moviĝas sur sia orbito. Kiam ni povas vidi la lunon, tiam ĝi marŝas sur la supra vojo sed kiam ĝi marŝas la malsupran vojon, ĝi ne estas videbla. Kiam la luno marŝas la supran vojon, tio estas funkciado de Cukijomi-no-Mikoto.⁴ Kiam ĝi vojaĝas tra la malsupra vojo, tio estas la funkciado de Susano-no-Mikoto.⁴ Ĉe l' unua ekrigardo al la luno, oni tuj sin demandas kio estas tiu figuro sur ĝi. Laŭ japanaj legendoj, tio estas simio kaj leporo farantaj kukajon. Sed vere, ĝi estas reflektajo de la kvin teraj kontinentoj. Kaj tial la figuro neniam ŝanĝiĝas.

Ofte kiam la luno ne estas plena oni povas rimarki la malklaran malhelan par-

ton de la luno. En tiu ĉi parto vidigas malhelaĵo: tio estas la ombro de la luno mem. Luna eklipso okazas kiam la luno estas lumigata de la suno je la dorsa flanko. Kaj suna eklipso okazas kiam la luno malhepas la sunon, enirante inter la suno kaj la tero. La argenta rivero (Lakta vojo) konsistas el sennombraj mallumaj steloj en la Granda Ĉielo videblaj por ni dank' al la suna lumo unue sendita al la glaciaj montoj de la Granda Tero, kiuj ĝin reflektas al ĉielo. Oni konstatas, ke la Argenta Rivero ne havas rektajn bordojn; tio okazas pro la neegala alteco de la glaciaj montoj, kiuj reflektas la lumon.

La kometoj marŝas en la «Grand-Granda Ĉielo» kaj kelkfoje oni povas ilin observi. La Grand-Granda Ĉielo estas la firmamento ekster nia malgranda universo kaj havas bluan koloron. Ni vidas ne nur la koloron, de la Granda, sed ankaŭ de la Grand-Granda Ĉielo kaj pro tio, la koloro kiun ni vidas estas miksaĵo de la du kaj aspektas lazura. Se oni rigardas la malgrandan universon de ekstere, oni rimarkas ke la Granda Ĉielo estas kovrita de spirita vualo el diversaj koloroj, purpura, ruĝa, blua, multe pli maldensaj ol tiuj de la Granda Tero, kiu estas kovrita de pli densa spirita vualo de flava, densblua kaj blanka koloro. Nia malgranda universo, kiel tutaĵo, portas purpuran koloron. Tial Dio nomas simbole nian malgrandan universon «Ucuŝikuni-no-Mitama» (la gemo purpura).

Nia malgranda universo situas en la centro de la Granda Universo kaj per sennombraj spiritaĵoj kiel araneaĵo komuniĝas kaj rilatas rekte kun ĉiuj aliaj malgrandaj universoj. En la aliaj universoj ankaŭ loĝas samaj vivantaĵoj preskaŭ similaj al homoj, bestoj, kreskaĵoj kiuj troviĝas sur nia tero; sed rilate al nia malgranda universo, aliaj steloj ol nia tero estas loĝataj de anĝeloj, kaj aliaj spiritoj, sed ne de samaj vivantaĵoj la teraj.

(daŭrigota)

⁴ Diaj nomoj donitaj al du malsamaj funkcioj de la luno.

POLPO KAJ KATO

— Hidemaru Deguči —

I

UNU tagon kato dormetis en marborda pinarbaro. Tien malrapide venis polpo el la maro. Fi, kato dormaĉas — diris al si la polpo — mi min regalos per tiu ĉi, ĉar mi fariĝis sufiĉe malsata. Subite li iris malantaŭ la katon kaj ĉirkaŭpremis lin per ĉiuj siaj piedoj, ne uzante ĉi-foje sian kutiman taktikon.

La kato vekigis surprizita kaj malfermante la okulojn, li trovis sin plenforte ĉirkaŭvolvita de la fiŝo tute simila al tiu, kiu estas ofte pendigata kun ruĝa koloro en fiŝvendejo. Verŝajne la polpo intencas tiri la katon pli kaj pli en la maron.

Kio? Ĉu tio ĉi estas sonĝo? — pensis la kato — Kia bonsanco, ke la karikaturo alvenis propravole kaj kaptis min. Mi jam delonge avidis mangi tian — kaj li ruzmiene ridetis.

Kaj li ekmanĝis facile unu el la piedoj, kiu troviĝis ĵus antaŭ lia nazo.

Dio mia — diris la polpo — kio okazis al mi? Mi devas pli klopori. Ŝajnas, ke li ne domaĝas la perdon de unu el la piedoj, el kiuj li havas ja ok entute. Li ankoraŭ ĉirkaŭpremis pli forte per ĉiuj fortoj.

La kato ekstazis pro la bongusto de la viando, kiun li mordis el la polpo kaj tuj mangis ankoraŭ du piedojn sinsekve. La polpo, kia ajn malsagulo li estu, nun ekrimarkis ke lia vivo estas minacata kaj li subite malvolvis siajn piedojn kaj forkuris.

Ve! Jam estis tro malfrue. Krome ankoraŭ dek metroj da distanco kuŝis ĝis la maro. Eĉ plena rapideco de la polpo ne superis al unu eksalto de la kato. Kompatinde la kapo de la polpo fine eligis la cerbon atakita de la kanino* de la kato.

2

Post kelkaj tagoj de la okazaĵo, posttag-

meze la kato estis sub la pinarbo, kiun li kutimis viziti kaj oscedis plengorge, rememorante pri la polpo, kiun li gustumis kun bonega apetito antaŭ nelonge.

Nun temas pri la infanoj, kies patro estis mortigita de la kato. Ili volis fari venĝon kontraŭ la kato. Post interkonsiligo, unu el ili surlandigis ĉe la bordo de la maro kaj kuŝis ŝajnigante endormiĝon. Baldaŭ la kato alvenis kaj vidante la polpon li murmuris lekante sian buŝon — Ho! Bongustaĵon mi denove povas mangi! La polpo forkuris en la maron kaj de tempo al tempo levigis sur la akvo kaj kuraĝis alproksimiĝi apud la katon, kiu fikse rigardis lin... kaj kelkfoje provis kapti la polpon plaŭdigante la akvon.

Tiam alia granda polpo stele iris malantaŭ la katon kaj apenaŭ li ĉirkaŭpremis la katon, li enkondukis lin en la akvon.

Multaj polpoj de la sama familio kiuj embuskis ĝis tiam, nun kaptis bonan ŝancon kaj ĉiuj samtempe ĉirkaŭvolvis sendistinge, ĉu piedon, ĉu voston... kaj fine dronigis la katon.

Tiel, kato forta sur la tero, estis venkata de polpoj, en la maro.

Trad.: O. Manai



Ho! Bongustaĵon mi denove povas mangi!

* =kojndento (Wüster)

ĈU IO BONA VENIS EL NAZARETO ?

Tezo premiita en la Floraj Ludoj (Palma, 1925)

(2)

E. L. Osmond, London.

UNUE la teatro ne estis ŝatata de Hebreoj, ĉar iliaj legoj ne permesis kruelecon al bestoj, do ili ne ŝatis ludojn en kiuj bestoj partoprenis; dramoj kiuj prezentis scenojn de edziga malfideleco, aŭ perforto naŭzis ilin, tamen tiu antipatio grade malaperis, kaj de la kristana epoko la Hebreoj verkis dramojn. La unua publikigita en hebrea lingvo estis verkita de Antonio Jose da Silva en 1763, kaj ĝiaj laŭdoj estis kantataj latine, hebree, kaj hispane, de dudek unu poetoj. Fragmentoj, kiuj ankoraŭ restas, estas eĉ nun laŭdataj de kritikistoj. «Deborah» dramo de Mosenthal, estis tradukita por la angla, itala, dana, hungara, kaj ĉeĥa teatroj. Kalisch, Fulda, kaj aliaj Hebreoj verkis komediojn por la germana teatro. Ludovic Halevy, nevo de samnoma komponisto, verkis operojn, komediojn, kantkomediojn, grandnombre, kaj Adolph D' Ennery (1811-1899), verkis pli ol 200, aŭ sole, aŭ kun aliaj; li kunverkis kun Jules Verne, Dumas, Thiboust, kaj Darbois. Henry Byron, kies patrino estis hebrea, verkis ŝercajn teatraĵojn en Anglujo; inter ili estis la bonekonata «Fra Diavolo», «Infanoj en la Arb-aro», kaj «Ne tiel malsaga kiel li aspektas», en kiu li mem ludis rolon. (1869). Usona Hebreo, Mordecai M. Noah, (1876), redaktoro de Charleston urba ĵurnalo, en 1810, verkis «La Vagantaj Knaboj», dramon kiu estis dum jaroj tre ŝatata de la popolo.

Inter hebreaj aktoroj estis Rachel, (Elisabeth Felix, (1820-1858), nur egalita de alia Hebreino, Sarah Bernhardt, (1844-). Dum multaj jaroj, Adolph, Ritter von Sonnenthal, Hebreo de Budapeŝto, (1834-), estis ĉefaktoro en Vieno. La aŭdantaro preskaŭ frenezigis kiam en 1881, li festis la 25an datrevenon en Hofburg Teatro; la prezentado estis ĉestata de la imperia

familio kaj la kortego. Oni vokis lin antaŭ korteno 42 fojojn, kontraŭe al tiea kutimo, kaj li ricevis titolon, Ritter, de la Imperiestro, oran medalon por arto kaj saĝeco, de la Reĝo de Bavarujo, kaj ordenon de la Ruga Aglo, de la Imperiestro de Germanujo. Ĉiu germana teatro ĉie, sendis al li salutojn kaj donacojn, kaj el Novjorko, li ricevis oran laŭkronon. Aliaj famaj aktoroj estis Madame Judith, (1829), John Braham, (1774-1864) kiu ne nur estis genia aktoro, sed posedis senegalan voĉon, Helena Levison, (1852-1888), kaj Rebecca Isaacs, (1828-1877). En Usono ankaŭ troviĝis eminentaj geaktoroj kaj teatretoj.

Pauline Lucca estis fama en Eŭropo kiel kantistino, kaj en Aŭstrujo estis la kontralta kantistino, Caroline Gompertz.

El literaturistoj estis precipe memorindaj, Isaac Disraeli kaj Georg Brandes, (1842).

La listo de muzikistoj estas tiel longa ke estas neeble eĉ menscii ĉiujn, sed se oni povus elstreĉi ĉiun hebrecan nomon, la ceteraj estus tre malmultaj aŭ nekonataj. Kiel irlandanoj, Judoj famigis pro muziko en tre fruaj tempoj. Lastatempe troviĝis, Felix Mendelssohn, (1809-1847), Jacques Halevy, (1769-1862), Meyerbeer, (1794-1863), Offenbach, (1819-1882), Straus, (1825-). En Anglujo, la ĉefoj estis Ignaz Moschees, (1794-1870), kies filo Felix, (1837-1917) estis fama pentristo, patrono de ĉiaj artistoj, kaj de paca kaj esperanta movadoj; Sir Julius Benedict, (1805-1885), Cowen (1852-), Sir M. Costa, (1810-1878), Sir A. Sullivan, (1844-). Francujo, Svedujo, kaj Usono ankaŭ havis geniajn komponistojn kaj muzikistojn. Eble la plej lerta pianisto estis A. Rubenstein; sed Rosenthal kaj Josef Hoffman estis ankaŭ eminentaj. Joachim estis senegala violonisto, kaj Blumenberg

en Usono, fama violonĉelisto. Laŭdire, Wagner iom kontraŭstaris hebrean supercon en muziko, sed kiam li produktis operon por montri la superan talenton de Teŭtonoj, li konsterniĝis, trovante ke en la prezentado, Hebreoj estis la ĉefaj violonistoj.

Pro religiaj kaŭzoj, ili ne frue estis pentristoj, tamen en Anglujo, Solomon J. Solomon, estis en la unua grado, kaj Josef Israels estis juste laŭdata pro siaj nederlandaj fiŝistaj bildoj. S. A. Hart estis la unua hebrea R.A. (ano de Reĝa Akademio) en Anglujo. Aliaj hebreaj artistoj estis Lehmann, Levy, Ullmann, kaj Wornas, en Francujo, Meyerheim kaj Schlesinger en Germanujo, Aŝkenazi kaj Baksta en Rusujo, Hynemann, Meyer, Peixotto kaj Jakob Lazarus en Usono. La rusa skulptisto Antokolski estis Hebreo, kaj la francaj, Solomon Adam kaj Emille Soldi. Moses Ezekiel, (1844-Virginia), montris skulptaĵojn en ĉiu eŭropa artejo, kaj Charles Waldstein el Novjorko, estis plej fama aŭtoritatulo pri greka arto kaj mitologio, kaj direktoro de Fitzwilliam Muzeo, Cambridge Universitato en Anglujo.

Inter arĥitektoj estas Hirsch en Anglujo, Charles Israels kaj Leopold Eidlitz en Novjorko, kaj Adler en Chicago, kiuj bone montras la genion de ilia raso. Wolf en Novjorko kaj Cohen en Baltimore estas famaj ingenieroj; Herchel de Holyoke estas aŭtoritatulo pri hidraŭliko.

En scienco, Maimonides (1135-1204), estis la mezepoka Aristotelo. Lia filozofia verko «Gvidilo por Konfuzitoj» estis tradukita en latinan, germanan, hispanan, kaj anglan lingvojn. Lia disĉiplo, Spinoza,* (1632-1677) enkondukis la realan kritikon aŭ interpretadon de la Biblio.

Pioniro de moderna germana literaturo estis Moses Mendelsohn (1729-1786), filozofo, ĉe kies hejmo vizitis Nicolai, Lessing, Goethe, Wieland, kaj aliaj. Ĉar li estis fidela al la juda religio, laŭ prusa leĝo li ne rajtis loĝi en Berlino, ĉar li ne naskiĝis tie. Sed samrasa komercisto, Bernard, prenis lin kiel serviston, kaj pere

de la afableco de la Marquis d' Argens, li ricevis permeson loĝi tie. Tiu privilegio ne rilatis al liaj posteuloj, kiuj devis kristanigi por esti liberaj. Pro tio, Heine, Ignaz Moscheles, Joachim, Rubenstein, Disraeli, Herschel, kaj aliaj alprenis la statan religion de siaj naciaj landoj.

La ĉefa historiisto de la kristana religio estis Neander, kies originala nomo estis David Mendel, (1789-1850). D-ro A. Ederheim, (1869-) verkis gravan «Vivo de Kristo» kontraŭ atako de Strauss. Famaj fakaj historiistoj estis, Da Costa (1798-1860) pri Nederlando, Sir F. Coben Palgrave pri Anglujo, (1788-1861), Romanin (1808-1861) pri Hungarujo kaj Venezia, Bresslaŭ (1848-) pri Germanujo, kaj Ludwig Geiger (1848-) pri la Renesanco. D-ro Cyrus Adler en Columbia Universitato estis aŭtoritatulo pri orienta historio kaj arĥeologio. Alia distinginda arĥeologo estis Profesoro Solomon Schechter de Cambridge kaj poste ĉe londona Universitatoj. Du el la fratoj Reinach,* (1858-), kaj Teodor (1860-) Solomon estis kleraj arĥeologoj en Francujo, kaj la tria, Joseph (1866-) estis sekretario al Gambetta, deputito, kaj redaktoro de «La République Française».

En ekonomia fako, Adam Smith (1723-1790), David Richardo (1772-1823), Karl Marx (1813-1883), kaj Ferdinand Lassalle (1826-1863), estis notindaj pro sia klereco. Multaj kolegio en Usono havis hebreajn profesorojn de politika scienco. En Francujo, Maurice Block (1816-), kapabla franca statistikisto, estis ankaŭ filologo.

La matematika fako estis speciale riĉa en profesoroj kaj kleruloj. Profesoro Jacobi (1804-1851), germana matematikisto donis sian nomon al certaj komplikaj kalkuloj, jakobianoj.** Profesoro Sylvester (1814-1894), kun amiko starigis modernan algebran sistemon. Filiowski (1817-1872), kompilis antilogaritmajn*** tabelojn.

(Daŭrigota)

* kies Historio de Religioj estas famekonata fontoverko.

** troviĝas en Wüster: «Enciklopedia Vortaro» (=ia funkcia determinanto)

*** necesa termino, kiu mankas en ĉiuj vortaroj: antilogaritmo—numero al kiu apartenas iu logaritmo, kiel 100 estas la antilogaritmo de 2 (laŭ The Oxford Dictionary).

* unu el la plej grandaj filozofoj de ĉiuj tempoj

La Spegulo de Macujama

(J A P A N A L E G E N D O)

Antaŭ longa longa tempo vivis iu sinjoro en la vilaĝo Macujama, provinco de Eĉigo*. Iam li devis forlasi sian hejmon kaj vojaĝi al la metropolo Kioto, pro urĝa afero. De Eĉigo li ne povis facile atingi la ĉefurbon dum kelkaj tagoj, ĉar tiutempe oni ne havis oportunan veturilon — vagonaron, aŭtomobilon, aŭ aeroplanon de la nuna moderna epoko. Do en tia okazo liaj familianoj bedaŭris la disigon.

La edzino diris: «Bonan vojaĝon! Mi atendas vin en ĉiama sopirado kaj kiel eble plej baldaŭ revenu al ni, nur tion mi deziras!». Jam en siaj okuloj aperis larmoj, sed la infano estis naŭva knabino, ŝi karesis la patron tirante lian manikon — «paĉjo, ĉar mi atendas vin ĝentile kaj obeeme al la patrino, nepre kunportu belan donacon!»

Post la foriro de la edzo, la edzino karesis la filinon: «vi kaj mi restas en la hejmo, vi estas aminda knabineto!», ŝi respondis ĉarme: «mi ĉiam estos aminda knabino, ĉar la patreto kunportos bonan donacon kiel vojaĝmemoraĵon.» «Jes, via amata patro kunportos donacon, ĉar mi ankaŭ petis pri tio.» «Ĉu vere? — mi estas feliĉa!» La patrino konsoligis kaj klopodis forgesi sian solecon amuzigante la filinon per ludiloj aŭ vespera rakonto en libera tempo.

La edzo revenis al ili. Lia vizaĝo bruniĝis dum longa vojaĝo. La familianoj ĝojkrie akceptis lin kaj informigis pri lia sano. La sinjoro malfermis sian valizon en la teĉambro kaj elprenis ĉarman pupon. «Kara filino, akceptu la donacon kiel premion, ĉar vi estis obeema al panjo dum mia foresto.» Kun surprizo la filino dankis al la patro pro lia bonkoreco. Al la edzino li donacis unu spegulon. «Jen tio ĉi estas por vi kiel donaco!» — Ŝi respekteme ricevis ĝin, sed ŝi ankoraŭ ne sciis ĝian uzmanieron, do demandis al li: «Por kio oni uzas ĝin?». Li bonhumore klarigis: «Tio nomiĝas spegulo, en kiu speguligas figuroj. Neniam oni povus aĉeti tian aferon tie ĉi en provinca vilaĝo, eĉ se oni dezirus. Do mi decidis aĉeti ĝin en Kioto por vi, karulino! Gardu la spegulon zorgeme!»

Kiel estis granda ŝia plezuro! Ŝi ĵuris

al li ke la spegulon ŝi zorgeme konservos, kaj ŝi konsideris ĝin kvazaŭ sia animo. Pasis kelkaj jaroj kaj la filino fariĝis plenaĝa junulino. Bedaŭrinde malfeliĉe trafis la patrino, kiu grave malsaniĝis. Malgraŭ ĉiuj kropodoj de la filino, la malsano de la patrino montriĝis pli kaj pli daĝera. Fine la patrino venigis sian filinon kaj fikse rigardante ŝin prenis sian manon kaj diris al ŝi: «Nun mi jam rezignis la vivon, se mi mortos vi des pli estu fidela al la patro. Kaj jen mi donas al vi la spegulon!» — Ŝi eltiris la spegulon, kiun ĉiam ŝi kunportis kun si kaj ŝi rakontis: «tiu ĉi objekto estas nomata "spegulo", kiun la patro donacis al mi kiel memoraĵon de sia vojaĝo al la metropolo. Estas kara spegulo! Se vi sopiros min post mia morto, vi observu la spegulon, ĉar ĉiufoje mi renkontos vin en la spegulo!» Tion dirinta ŝi mortis ĉar eble ŝi sentis jam trankvilecon. La filino kaj la edzo elkore ploris pro ŝia morto apud la kadavro. Sed nun nenio helpis kaj ili aranĝis funebran ceremonion. Tamen la filino ĉiam sopiris la patrino kaj pasigis tagojn en ploro — ŝi iun tagon ekmemoris la promeson de la patrino.

«La patrino promesis al mi ke mi ĉiufoje renkontu ŝin en la spegulo. Mi estis malsaga fogesinte tion nur ploradis. Nu mi provos la spegulon!». Kaj ŝi eligis la spegulon el kesto kaj fikse rigardis en la spegulon. Jen miraklo aperis! La juna kaj eleganta vizaĝo milda de la mortinta patrino aperis en la spegulo. Ho, la patrino! La filino ĝojegis. «La spirito de la patrino estas en la spegulo, kaj ŝi certe amas min, kiu ĉiam sopiras al ŝi. Kiam ajn mi povas renkonti ŝin! Granda plezuro!» De tiam la filino konsolis sian ĉagrenon per tiu ĉi spegulo, matene aŭ vespere, ĉiutage.

Poste la patro edziĝis al alia virino kaj la fidela filino servis al la duonpatrino kiel al la antaŭa vera patrino, ĉar ŝi havis bonan kaj sinceran koron. Vidinte tion la patro estis kontenta, sed baldaŭ la duonpatrino inkliniĝis esti malica al la duonfilino. Ŝi intence raportis al la edzo, ke la filino estas malgentila aŭ malfidela, sed la patro des pli amis la filinon, ju pli ofte aŭdis

* la nuna prefektejo Niigata, en norda Japanujo.

ŝian malican raporton. Tio ne donis bonan impreson al la duonpatrino, kiu fine decidis, ke ŝi jam ne lasos resti la filinon en la sama hejmo. Ŝia jaluzo fariĝis terura.

Iun tagon la duonpatrino diris al la edzo: «Hodiaŭ mi disiĝos de vi.» — kun ŝajna mieno mensoge plorema. Neatendita ŝia propono surprizis la edzon kiu demandis la kialon.

«Mi neniam deziras foresti de vi, sed mia vivo estas en danĝero! Bonvolu min forpermesi!» — ŝi lerte ploris klinante la kapon. Li ne povis lasi ŝin kaj petis klarigon: «Ĉu via vivo estas en danĝero! pro kio? ne kaŝu faktojn!» «Ĉar la filino min malbenas farante sorĉan preĝon en la ĉambro, en kiu skulptas ligneton laŭ mia figuro. Ŝi malicas ĉar mi estas la duonpatrino. Baldaŭ mi mortos pro ŝia terura sorĉo malbena!».

Tion aŭdi te li pensis, ke temas pri mensogo kiel kutime, sed kial lastatempe la filino ne forlasis la ĉambron, estante en ĝi sola? Ĉu eble ŝia diro estus vera? Nun li mem eksuspektis kaj decidis kontroli kiu estas prava. Lia filino respektis kaj amis la duonpatrinon kiel la antaŭan, sed la duonpatrino siavice ne amis ŝin kaj eĉ malice raportis mensogaĵon al la patro, Terura estis ŝia jaluzo! La filino ĉiam sopiris al la mortinta patrino, kiu iam dorlotis ŝin. Kiam ajn ŝi havis liberan horon, ŝi eliris la spegulon por renkonti la patrinon. Iun tagon ŝi estis en la ĉambro kiel kutime, kun la spegulo, jen venis aliulo. Kiu estas la envenanto? — estis la neatendata patro, konfuzite ŝi kaŝis la spegulon malantaŭ si.

La patro malbonhymore riproĉis ŝin:

«Kion vi faras nun?»

«Mi»

«Kion vi kaŝis malantaŭ vi?»

Ŝia silento indigigis la patron.

«La diro de la edzino ne estis do mensoga! Vi ja intencas mortigi ŝin per sekreta sorĉo! Filino devas esti kiel vera filino, eĉ se la patrino estas duonpatrino. Kiel vi ekhavis malbonan koron? malfidelulinon!. Li indulge kaj laŭvoĉe riproĉis la filinon.

Ŝi kiu neniam supozis tian aferon, plorante respondis al la kolerega patro. «Atendu momenton. Mi estas ĉiam fidela al vi gepatroj. Mi neniam intencis mortigi la patrinon eĉ en songo. De kie devenas via erara riproĉo al mi?»

«Do kial vi lastatempe restadas en la ĉambro sola? Kaj vi nun vidinte min kaŝis tian aferon. Montru, kion vi kaŝas!»

Ŝi decidis ĉion klarigi montrante la spegulon, se ne, ŝi neniam povos konvinki la patron. «Mi rigardis en la spegulon!» Ŝi metis ĝin antaŭ la patro. Li prenante ĝin sentis miron.

«Ho, tio estas la valora spegulo, kiun mi donacis al la mortinta edzino kiel memoraĵon de mia vojaĝo al la metropolo. Sed kial vi rigardadas tian aferon?»

«Pri tio mi klarigos» — ŝi rakontis la diron de la vera patrino kaj denove la patro demandis — «Ĉu la animo de la mortinta patrino loĝas en ĝi? nekredibla estas via parolo, ke vi renkontas la patrinon kiam vi sopiras al ŝi. Ne mensogu!»

«Neniam mi mensogis al vi! Ĉu ankoraŭ vi estas suspektema? KREDU al mi, jen la patrino aperis en la spegulo, ho patro, vidu la patrinon!» — dirante tion ŝi montris la spegulon en kiu speguligas ŝia propra vizaĝo. — «Ĉu vi ankoraŭ dubas mian parolon?» — ŝi aldonis kun serioza mieno.

La patro rompis la manojn kaj kortuŝite kriis: «Kiel vi estas sincera kaj fidela al la mortinta patrino! La vizaĝo en la spegulo ja estas via propra! Ĉar la mortinta patrino kredigis vin, ke ŝi aperos en la spegulo. Pro via simileco al ŝi, vi naive sopiradis al ŝi ĝis nun kun nenia dubo! Mi estas kortuŝita kaj emociita de vi, konstatante la noblecon de via animo. Mi estis kulpa! Kial mi eĉ momenton kredis al la malica diro de la duonpatrino? Pardonu min, naiva karulino!»

En liaj emociitaj okuloj larmoj aperis pro tiu rakonto de la filino. La duonpatrino kiu spionis la scenon en la apuda ĉambro ankaŭ kortuŝite venis antaŭ la filinon, kaj ŝi ĝentile klinis la kapon, pardonpetante:

«Kiel malnobla estis mia korteniĝo kontraŭ vi, kiu havas justan kaj varman koron. De nun mi sangigigos! Pasintan aferon ne riproĉu, ĉar mi de nun renovigos la koron. Estu same fidela ankaŭ al mi kiel al la mortinta patrino ĉar mi amos vin kiel mi nur povos!»

De tiam la gepatroj kaj la filino vivis en gaja harmonio.

Traduis T. Kamimura

Studo pri la japana mito de "sinpurigo"

(Unu ĉapitro de l' Japana Mitologio)

— *Kijo Cujuki, Tokio.* —

Potenco de akvo. Akvo — oceano, rivero kaj lago — estas forta ekscito por homoj. Senlima vasteco kaj kvanto, trankvila koloro ensorĉas primitivulojn. Antikve, en la animismaj¹ tempoj, akvo estis ofte objekto de kultoj: kiel okaziganto de timo, puriga rimedo kaj sorĉa potenco. Akvo lavas kaj purigas malpuraĵojn; ko sekvenco, oni kredis ke ĝi havas ankaŭ spiritalajn malpuraĵojn.

La japana Mitologio, laŭ «Kojiki» rakontas tiamaniere: «Kiam la dio Izanagi revenis de l' Infero (=Subtera Mondo), li diris: «Mi revenas de malbelega kaj malpurega lando! Mi do purigos mian korpon.» — Laŭ «Nihongi», Izanagi revenis de l' Infero kaj diris kun bedaŭro: «Nu, mi ĵus vizitis tre, tre malpuran landon, mi do purigos mian korpon.»

Laŭ tiuj ĉi dokumentoj, la dio Izanagi sinbanis en akvo por purigi sin, reveninta de l' Infero. Ĉe posteuloj la ago de *sinpurigo* fariĝis simbola, kvankam en la komenco oni celis nur la purigadon de l' korpo, sen religia rilato.

«Venteto, rivereto,
En Nara . . . vespero!
Ĉu do jam someriĝas,
Ĉar oni sin banas?»

Laŭ la supra «waka»² ni vidas, ke en la antikveco oni kutimis sin bani en riveroj. Simila moro ekzistas ĝis hodiaŭ en Polinezio. *Cook*³ skribas en sia verko «Unua Vojaĝo»: «Estas ĝenerala kutimo ĉe viroj kaj virinoj, bani sin en rivero unu fojon ĉiutage, foje eĉ pli ofte.» Bananto, kiu trempiĝas kaj ricevas malvarman fluon sur sin, forlavas ne nur varmon kaj malpur-

aĵojn sed ankaŭ laciĝon kaj ĉagrenajn pensojn; tiel okazas purigado de ambaŭ korpo kaj animo. Ni do komprenas, kial orientaj pensuloj altigis la banon al religia ceremonio. Por ili, la bano estas tiel soife dezirata, ke ĝi fariĝis religia devo.

Ekde la antikveco, japanoj klopodas teni siajn korpon kaj animon puraj. Eĉ geografio montras, ke popolo kiu loĝas en lando ĉirkaŭata de maro nature ŝatas purecon, dume popolo loĝanta sur ebenaĵo sen montoj kaj maro, al kutimiĝas al malpureco. Japanoj ŝatas purecon, penas forigi malpuraĵojn de l' animo samkiel de l' korpo. Antaŭ ĉiu sintoisma⁴ sanktejo oni vidas lavujon en kiu kredantoj lavas siajn manojn kaj buŝon, antaŭ ol kliniĝi antaŭ la altaro.

Ni devas mencii tie ĉi la moron de Izraelidoj: Moseo starigis lavujon inter la tabernakloj de l' altaro, en kiu troviĝis akvo por sin lavi. Moseo, Aarono kaj liaj filoj lavis siajn manojn kaj piedojn kiam ili eniradis la templon kaj aliradis la altaron.

Malpuraĵo samtempe signifas malbonan moralon kaj pureco — bonan moralon. Oni do povas kompreni, ke tia ideo pri *sinpurigo* respeguliĝis en la Japana Mitologio.

Kostumo de pra-japanoj. Laŭ la mitologio, la dio Izanagi demetis ĉiujn vestaĵojn kiujn li portis antaŭ ol sin purigi; ni do povas imagi, laŭ tiu ĉi dokumento, la antikvan japanan kostumon. La malpuraĵoj kaŭzitaj de lia kontaktigo kun la mortintoj de l' Infero estis forlavataj. La objektoj kiuj tuŝis la landon Infero, estis do *malpuraj*. Ankaŭ Izraelidoj forĵetis, disrompis aŭ metis en akvon la objektojn, kiuj tuŝis malpuraĵon. El la malpuraĵoj, kiujn Izanagi forĵetis, aperis diversaj

1) animismo: kredo pri la vivanteco de l' naturo — laŭ Wüster.

2) 31 silaba poemo, libere tradukita

3) la malkovrinto de Novzelando

4) Sintoismo estas la nacia religio de l' japanoj ĝis hodiaŭ; krome ili povas aliĝi al alia religio.

spiritoj de malbono kaj ankaŭ spiritoj de protekto kontraŭ ili. Laŭ «Kojiki», la dio Izanagi diris: «La supra parto de l' fluo estas rapida, la malsupra estas malrapida» — kaj li malsupreniris en la mezan parton kaj trempis sin. Tiu ĉi rakonto religie klarigas la originon de la «sinpurigo», kiu estas la plej grava elemento de Ŝintoismo kaj samtempe ĝi difinas la sencon de *malbono* kaj *malpuro*. Ĝi ankaŭ donas al ni ideon pri la *sinpurigado* de l' prajapanoj. Unu el la ŝintoismaj ritoj nomiĝas «*Oohurai*». Ĝi estas ceremonio farata de l' pastro je la fino de ĉiu donjaro por «forigi ĉiujn pekojn» faritajn de l' homoj dum la pasinta periodo. Laŭ Ŝintoismo peko kaj malpureco estas fontoj de ĉiuj malfeliĉoj. Laŭ la tradicio, ĉiujn malpuraĵojn ricevas la diino *Seoricu* kaj transportas ilin al la maro; ĉiujn ricevas *Huja-aki-cu* kaj *Ibuki-do* kiuj forblovas ilin en la Subteran Landon; tie la diino *Huja-sasura* ilin disjetas. Alivorte, oni kredis, ke ĉiuj pekoj kaj malpuraĵoj venas el la Subtera Lando; tial oni resendis ilin en la saman Landon de l' vento, de l' riveroj kaj la maro.

Maniero de Purigado. Kiel mi jam priskribis, akvo havas purigan potencon, sed fluanta akvo pli multe posedas ĝin ol stagnanta. Tia kredo ekzistas ankoraŭ en la Sudpacifiko. La popolo de l' insuleto *Bati*, oriente de *Javo*, kvankam korpe simila al la javanoj, tamen diferencas laŭ kutimoj kaj moroj. La *Batianoj* konservis la antikvajn tradiciojn de l' Hinduismo kaj ili cindrigas kadavrojn. La ritoj rilate al la kremacio⁵ enhavas sinpurigon per riverakvo. Sed ĉe pli efika estas marakvo. Ĉe ni, posteuloj, simpla salo fari is simbola purigilo. La moro abomeni malpuron de mortinto ankoraŭ vivas inter ni; post funebra ceremonio japanoj eniras sian domon *puriginte sin* per iom da salo. — En la malaja lingvo kaj aliaj sudpacifikaj idiomoj oni sinonime esprimas salon, salakvon kaj maron. En *Malagasy masina* signifas sankta aŭ efika, kaj laŭlitere ĝi estas salo. Arabe, *masi* estas salo, pureco kaj sincereco. Salo

estas do natura simbolo de pureco aŭ sincereco kaj ĉiam ĝi estis tiel rigardata de l' semitoj.⁶

La Japana Mitologio — laŭ «Kojiki» — rakontas pri la demonoj kiuj aperis ĉe la purigado de l' dio Izanagi, reveninta de l' Infero: «Tiam aperis la demono de Okdek Malbonoj kaj tiu de Granda Malbono. Tiuj ĉi du naskiĝis el la malpuraĵo, kun kiu li kontaktiĝis en la abomeninda Lando. La nomoj de l' dioj kiuj sekve naskiĝis por rektifi tiujn ĉi malpuraĵojn estas: Dio de Rebonigo, Dio de Granda Bonigo kaj Diino de Klareco. Kiam Izanagi lavis sin, ĉe la fundo de l' rivero aperis ankaŭ dioj: Dio de Marfundo kaj Viro de Fundo. Kiam li lavis sin en la mezo de l' rivero aperis la dioj: Dio de Meza Maro kaj Viro de Mezo. Kiam li lavis sin ĉe l' surfaco aperis Dio de Marsurfaco kaj Viro de Surfaco.»

Apero de tri eminentaj Infanoj. Laŭ «Kojiki», kiam la dio Izanagi lavis sian maldekstran okulon, aperis la diino Amaterasu (Ĉielon-lumiganta) kaj kiam li lavis sian dekstran okulon, aperis la dio Cukijomi (Luno); kiam li lavis sian nazon, aperis la dio *Take-haja-Susanoo* (Bravrapida-impeta-Viro). Pri la apero de tiuj ĉi tri dioj «Nihongi» iom malsame raportas: «Kiam li ekprenis la Spegulon el nikelo per sia maldekstra mano, aperis la Sun-Diino, kaj kiam li prenis la Spegulon per la dekstra mano, aperis la Lun-Dio; kiam li turnis sian kapon, aperis Dio-Susa. Cetere, la priskribo de «Kojiki» koincidas kun tiu de «Nihongi».

Ĉe la okazo de l' sankta ago, aperis el la maldekstra okulo de Izanagi la Sun-Diino Amaterasu, kiu estas la Imperia Prapatrino de Japanujo, la plej altranga kaj plej nobla el la naciaj dioj; la Lun-Dio aperis do el la dekstra okulo. Tiu ĉi koncepto estas tre bone komprenebla, ĉar similaj estas troveblaj ankaŭ en alilandaj mitologioj. Generale Suno kaj Luno estas

6) Netrovebla en la ĉefaj Esp. vortaroj sed ŝajne necesa neologismo. Laŭ Oxford Dictionary, ĝi signifas la komunan rason de hebreoj, armenoj, fenicianoj, araboj kaj asirianoj (la lastaj vortoj estas zamenhofaj).

5) Laŭ Fulcher-Long: bruligo aŭ cindrigo al kadavroj.

Japanana lingvo por Esperantistoj

(12)

Alternativo

La Alternativo estas speciala kazo de l' japana lingvo; ĝi konsistas el du partoj kiuj estas en opozicio:

Kono Kuni no Yama wa takakattari
この 國 の 山 は 高かつたり
hikukattari desu.
低かつたり です。

La montoj de tiu ĉi lando estas ĉu altaj,
ĉu malaltaj.

(Rimarko: kuni=lando; yama=monto; takai=
alta; hikui=malalta)

Oni povas traduki la *adjektivan alternativon* en Esperanton per ĉu... ĉu; aŭ... aŭ; unuparte... aliparte, ktp. — La formado de tiu ĉi Alternativo konsistas en aldono de l' sufikso *-kattari* al la radiko. La alternativon de l' verbo ni studos poste, kun la ceteraj konjugacioj.

Komparativo

Supereca Komparativo

A.) La bazo de l' komparo estas esprimata.

Nippon-go wa Eigo yori (mo)
日本語 は エイゴ より (も)
mutukasii.
むつかしい。

La japana lingvo estas pli malfacila ol la angla.

(Rimarko: nihongo=japana lingvo; eigo=angla lingvo; mutukasii=malfacila)

Kiel oni vidas, la *supereca komparativo* estas esprimata per *yori* aŭ *yori mo*, kiu sekvas la vorton servantan kiel bazo de l' komparo.

En la japana lingvo oni povas kompari ankaŭ verbon al adjektivo, verbon al verbo kaj eĉ tutan propozicion al tuta propozicio:

Uti ni nete iru yori sanpo
内に ねて 居る より さんぽ
suru hō ga yoi.
する 方 が よい。

Anstataŭ dormi hejme, promeni estas preferinde.

((Uti=domo, hejmo; sanpo suru=fari promenadon; (ĉin-origina verbo, suru!); hō=ni tuj klarigos ĝin ĉi sube))

Oni notu ke en tia okazo *yori* sekvas la Prezencon.

La vorto servanta kiel kompar-bazo kaj sekvata de *yori* povas ankaŭ stari unue; tiamokaze la vorto komparata *povas esti* sekvata de *hō* kiel en supra ekzemplo. *Yori* estas ankaŭ ofte sekvata de *kaette* (=kontraŭe al la supozo):

Kodomo wa Otōsan yori kaette
子供 は お父ちゃん より かえつて
ōkii.
大きい。

La infano estas pli granda ol la patro.
(kontraŭe al la supozo)

(Rimarko: kodomo=iufano; otōsan=patro; kaette=kontraŭe, prefere; ōkii=granda)

Malsupereca Komparativo

Yori estas anstataŭigata de *hodo*:

Eigo wa Nihongo hodo mutu-
えいご は 日本語 ほど むつ-
kasiku nai.
かしく ない。

Speciala kazo de Komparativo en la japana lingvo estigas kiam oni volas esprimi ke io — kvankam malbona en si mem — estas tamen pli bona ol io alia: tiam oni uzas la japanismon *yori masi desu*:

Kono Sakana wa Niku yori masi
この魚は肉よりまし
desu.
です。

Tiu ĉi fiŝo estas (kvankam malbona) pli bona ol viando (kiu estas ĉe pli malbona).

(Rimarko: sakana=fiŝo; niku=viando)

La adverba Komparativo de Esperanto pere de *ju...des* estas esprimata en la japana lingvo per *hodo* post adjektivo (I) aŭ verbo (II):

(I) hayai hodo yoi.
早いほどよい。

(II) Hikōki ga noboru hodo
ひこうきがのぼるほど
samuku narimasu.
寒く なります。

Ju pli la aeroplano altiĝas, des pli malvarmiĝas.

(Rimarko: hayai=rapida, frua; hikōki=aeroplano; noboru=leviĝi; samui=malvarma; *narimasu*, la ĝentila konjugacio de *naru* korespondas al la Esperanta sufikso ...iĝi).

Krom la ĵusa simpla formo, ekzistas ankaŭ alia, iom pli komplika, sed samsenca:

Anstataŭ (I) ni povas diri: *hayakereba hayai hodo yoi*, kaj anstataŭ (II): *Hikōki ga noboreba noboru hodo samuku narimasu*.

Rimarku, ke *hayakereba* kaj *noboreba* estas la kondicionala prezenco de l' adjektivo *hayai* (rapida) kaj de l' verbo *noboru* (altiĝi) respektive.

Superlativo

La Superlativo estas esprimata per

itiban (unua), *mottomo* (la plej), *hiszyō ni* (eksterordinare, tre), ktp. Ekzemple:

Nihon no Hana no uti de Sakura
日本の花の中でさくら
ga itiban utukusii.
が一番美しい。

El la floroj de Japanujo, ĉerizfloroj estas la plej belaj.

(Rimarko: hana=floro; sakura=ĉerizfloro; utukusii=bela)

Grava rekomendo por lernantoj: konstante konsultu la tabelon aldonitan al nia maja numero (aparte havebla por 1 respondkupono).



Japana pilgrimiranto ludas la blovinstrumenton «ŝakuhaĉi».



K. Kalocsay skribas en *Lingvo-Stilo-Formo* (p. 71): «Li estas *la* Esperanta verkisto (tiel eminenta, ke li povas kvazaŭ sola pretendi la titolon Esperanta verkisto)». Pro honeste mi devas menci, ke temas pri gramatika ekzemplo rilate al la uzo de la difina artikolo. Tamen, psikanalizo instruas... Ne, altestimata Sinjoro, *la* Esperanta verkisto ankoraŭ ne naskiĝis!

Alvoko: Legantoj kaj recenzistoj! Helpu nin pliperfektigi Oomoto Internacia. Ni bezonas vian kritikan kunlaboradon. Bonvolu senĝene riproĉi la erarojn kiujn vi eventuale trovas en nia gazeto. Rimarkigu al ni la malĝustecon de niaj *ideoj* kaj la malperfektocon de la esprimo de tiuj ideoj — se vi trovas tiajn. Ni volonte publikigos resume ĉiujn kritikojn kaj rekonos nian kulpon publike, se ĝi estas pruvata. Aliparte, se vi ŝatas Oomoto Internacia, se vi kredas ke niaj ideoj kaj nia stilo estas bonaj, bonvolu ankaŭ tion sciigi al ni ĉar tiamaniere vi kuragiĝos nin en nia ĉiutaga laboro por Esperanto kaj por niaj idealoj. Anticipe dankas vin la redaktoro de Oomoto Internacia.

Konsiloj al Recenzantoj

Yamato Masaharu

Objektiveco.

Jugu objektive — super ĉio. Ne tro gravigu personaĵojn. Sed se iu persona elemento helpas en via kritika laboro — se vi sentas, ke estas via *devo* konigi al la publiko iun personan trajton de l' kritikata aŭtoro, por ke oni povu lin pli bone kompreni — faru vian devon, eĉ se mil demagogoj malpermesas ĝin al vi! L. Totsche, en la 1-a n-ro de Bibliografia Gazeto konsilas eviti personaĵojn — sed nur por la aliaj; li mem, unu paŝon poste, atakas personaĵojn, sen neceso, nur por *venĝi sin* pro ricevita, nekontraŭdireble justa kritiko. Evidu tian farizean manieron.

Estu kuraĝa en viaj asertoj, ĉar vi formis ilin post matura pripenso kaj vi

diras vian honestan konvinkon. Se vi agos tiel, vi sekvos la tradicion de la plej alt-nivelaj, naciaj literaturaj revuoj. Ne timu uzi fortajn esprimojn; estu viro, ne estu timema bubo.

+

Senpartieco.

Ne lasu vin gvidi de komerca profitemo. Ne laŭdu nur la verkojn, kiujn via entrepreno eldonas. Ne flatu lakee vian mastron kaj ne tremu pro timo, ke li fordungos vin en la mala okazo kaj vi estos ĵetata sur la merkaton de l' nevendeblaj homaj labormaŝinoj. Ne lasu, ke via malamo kontraŭ la persono aŭ la ideoj de via antagonisto blindigu vian konsciencon. Superu vin mem; kiam vi kritikis, vi estas *publika viro*. Prenu moralan respondecon, ne timu la konsekvencojn de tio kion vi skribis: eĉ fordungiĝo, ja eĉ morto estas malestimataj de viroj, kiuj havas *karakteron*.

+

Batalu kontraŭ la reformo-maniuloj.

Subtenu nin en la defendo de la *pure samenhofa sti'o* kaj helpu nin *purigi la aŭgion** staton de nia literatura ĝangalo. Al la «purigistoj» ni ne aliĝis — estis ni, kiu *iniciatis* la ĝeneralan purigadon konforme al la spirito de Oomoto-doktrino. Al ni aliĝis la tuta publika opinio de Esperantujo; krom la kulpigitaj reformemuloj, neniu kontraŭdiris nin (el *iti* unu kontraŭdiris ne-rekte, sub pseŭdonimo, la aliaj silentis kaj

* **Aŭgia stalo**; trovebla en Wüster: Enciklopedia Vortaro; rilatas al la greka mitologio.

reformis sian agadon!). Ni atentu, ke nia venko estu daŭra. Legantoj helpu nin, aligu al la tendaro de la *senriproĉaj kavaviroj de la verda stelo!*

+

Evitu insultojn.

Esprimu viajn pensojn — se vi havas tiajn per la literatura terminaro; ne utiligu la Necesajn Terminaron, kiu estas parto de l' Parnasa Gvidlibro (laŭ J lio Baghy, vidu lian artikolserion aperintan en Oomoto Internacia). Se vi koleras pro iuj asertoj de via antagonisto, kalkulu ĝis 1000 antaŭ ol skribi vian respondon. Reko rencu la kalkuladon ĉe la korekto de ĉiuj 25 presprovaĵoj — tiamaniere ankaŭ vi rajtos esperi, ke ne estos tro da preseraroj!

+

Respektu Orientanojn.

Estas nebezone konsili al Orientanoj, ke ili respektu Okcidentanojn — dum jarcentoj kaj ankoraŭ hodiaŭ ili nur troestimis ilian valoron. Sed estas nepre necese forte konsili al Okcidentanoj la respekton al Orientanoj. Ĉiam memoru, ke antaŭ jarmiloj, kiam via prapatro lude pendbalancis desur arbobranĉo (Darvinismo

estas ja okcidenta doktrino)... Orientanoj jam estis kulturhomoj en tiu tempo. Tia konsilo devus esti nenecesa inter Esperantistoj — sed la faktoj montras, ho! — ke ĝi estas pli necesa ol en la angla literaturo, ekzemple. Malgraŭ tio, ke Esperanto devus permesi senperan interrilatigon inter la du mondoj Orienta kaj Okcidenta kaj la diversaj rasanoj povus per ĝi akiri ekzaktajn konojn pri siaj reciprokaj vivo kaj kulturo, tiuj kontaktoj ne efektiviĝas sufiĉe ofte en Esperantujo. Anstataŭ elpensi novajn neologismojn, tute nenecesaĵoj kaj kiuj nur pligrandigas la malfacilecon por Orientanoj, diligente ekstudu pri la kulturoj *hinda, ĉina kaj japana*. Ne sufiĉas fiere elmontri orientajn esperantaĵojn en viaj ekspozicioj kaj poste piedbati la orientajn samideanojn per ĉiuspecaj arogantaj frazoj, kiujn ili ja ne toleros por eterne — vi devas konsideri ilin kiel viajn egalulojn kaj ofte kiel viajn superulojn, kondiĉe kompreneble ke iliaj kvalitoj tion postulas. Kaj se vi kredas montri vian sagacecon atakante la malmultajn Okcidentanojn kiuj defendas Orientanojn (kun aŭ sen komision!) — vi eraras. La koncernaj orientalistoj nur respondos al vi per la arab-origina proverbo: Hundo bojas, karavano vojas!

Parolas la Legantaro:

En tiu ĉi rubriko, ni publikigos, de tempo al tempo la opiniojn de nia Legantaro pri Oomoto Internacia. Ĝis nun nur alvenis kuraĝigaj kritikoj, tial, vole-nevole, ni ne povas publikigi mallaŭdajn opiniojn...

LA unuan lokon en la vico de niaj aprobantoj meritas *du* homoj: ili ambaŭ estas tiel eminentaj, ke ni ne povas ne meti ilin en apartan kategorion: Sinjoro **John Merchant**, prezidanto de la Esperanto Movado kaj **Julio Baghy**, poeto-esperantologo, eks-ĉefredaktoro de Literatura Mondo. La favora opinio pri Oomoto Internacia de ambaŭ sinjoroj estas esprimita plej bone per la daŭra kunlaborado kiun ili bonvolas doni al nia gazeto. Por konvinkiĝi pri tiu ĉi punkto, ni alvokas la

intereson de l' afabla leganto al la letero de sinjoro John Merchant publikigita en la maja numero kaj al la artikolserio de Julio Baghy «Dangera Vojo» aperinta, en la 2, 3, 4 kaj 5a numeroj de Oomoto Internacia,* en 1933.

Aliajn favorajn opiniojn ni publikigas ĉi-sube tute sisteme; la antaŭeco de iu nomo absolute ne signifas, ke ni atribuas al ĝi pli grandan valoron ol al la sekvaj.

* Ĉiuj haveblaj ankoraŭ po 2 respondukuponoj.

S-ro **Reginald BANHAM**, F.B.E.A. estas la redaktisto de la *Suda Kruco*, la altnivela esperanto-organo de l' Aŭstralia Kontinento kaj Novzelando. Li estas unu el la plej akracerbaj kaj senpartiaj kritikistoj en Esperantujo. La redaktoro de Oomoto Internacia estas feliĉa kalkuli tiun kolegon inter siaj intimaj korespondamikoj. Ni ne volas fanfaroni publikigante citaĵojn el liaj laŭdaj leteroj, ni simple notas lin inter niaj aprobantoj.

Sinjorino **E. L. Osmond**, *Londono* estas bone konata samideanino, verkistino talenta kaj fervora ano de diversaj kulturaj movadoj. Ŝi ankaŭ bonvolas honorigi la redaktoron de Oomoto Internacia per sia amikeco, jam de pli ol dek jaroj. La modesteco de nia londona samideanino ne permesas publikigon de ŝiaj favoraj opinioj. La daŭra kunlaborado, per kiu sinjorino E. L. Osmond honorigas nian gazeton estas tamen la plej bona pruvo por ŝia aprobo.

S-ro **Bertram Potts**, bone konata verkisto anglalingva en Novzelando, profesia ĵurnalisto kaj verkisto estas ankaŭ perfekta Esperantisto kaj originala verkisto en nia lingvo. Li ne estas sufiĉe bone konata ankoraŭ, ĉar liaj multflankaj okupiĝoj ne donas al li sufiĉan tempon por verkado en nia lingvo. Ni tamen esperas, ke iam li konsentos permesi al ni, ke ni koniglu lian talenton sur la paĝoj de Oomoto Internacia. Li ankaŭ estas varma subtenanto de nia gazeto kaj *precipe aprobas niajn kritikajn artikolojn*, kiujn li nomas «majstraj».

Fraŭlino **Coralie Smythson**, talenta poetino en la angla lingvo, gvidanta membro de la Franca Klubo, de l' moderna teatra movado, de l' baleta grupo kaj de l' Esperanto Grupo de Wellington, Novzelando estas ankaŭ Reprezentantino de Oomoto por tiu lando de l' suda hemisfero. En ŝiaj detalaj leteroj ŝi plene aprobas nian agadon kaj kuragiĝas nin, konsilante tamen eviti personaĵojn, — kiun konsilon ni plej eble klopodos sekvi, kompreneble. Fraŭlino Coralie Smythson donis al ni la per-

meson citi la sekvajn liniojn el unu el ŝiaj leteroj:

«Mi ne volas kritiki «Por Recenzo» (de Sturmer-Kenelm-Robinson, la Radakcio) el la vidpunkto de stilo sed mi kredas, ke ĝi estas simple ridinda kiel novelo (aŭ romano). Koncerne ĝian abruptan finon, kvankam ni estas kutimigitaj esti «lasataj en la aero» ĉe la fino de modernaj libroj — ekzistas finiĝoj kaj finiĝoj! Kiel mi skribis antaŭe, mia impresio estas, ke Sturmer komencis verki pli longan kaj valoran libron — sed li laciĝis dum la verkado kaj fine finis ĝin kiel ajn, nur por lernantoj, por eldoni ankoraŭ unu senutilan libron en Esperanto, ne zorgante, ĉu ĝi estas bona aŭ ne.»

Post la majstra kritiko de fraŭlino Coralie Smythson, ni detenos nin de aliaj komentoj.

S-ro **Josefo Hanuŝ**, fervojisto en Ceska Lipra, Ĉeĥoslovakio skribas:

«Hazarde mi ricevis vian belegan gazeton Oomoto Internacia. Kvankam mi estas «senreligiulo», atente mi tralegis ĝin kaj mi devas diri, ke tio kion vi skribas en ĝi, tre similas al miaj pensoj. Mi devas rimarkigi, ke mi ne estas ano de kiu ajn sen- aŭ kontraŭ-religia societo. Mi simple ne kredas asertojn de pastroj; tamen mi kredas ke Iu devas ekzisti, kiu regas la Universon; ĉu li estas Dio aŭ Naturo, mi ne scias. — Viaj artikoloj en la gazeto tre klare montras, ke vi klopodas edukadi la homojn por ke ili faru nur la bonon. Ankaŭ la ceteraj artikoloj tre plaĉas al ni, ekzemple pri Mondpaco, Kontraŭ la Neologisma Febro (la substreko estas la nia, la Radakcio), ktp. Precipe en la lasta artikolo vi estas pravaj. Ankaŭ via kritiko de l' nove verkitaj literaturajoj estas tre lerte redaktita. Akceptu do esprimon de mia admiro kaj vere esperantistan saluton!»

— Niavice ni kore dankas la sinceran aprobon de nia simpatia ĉeĥa leganto.

S-ro **Friedrich Hahn**, Bremen, Germanujo estas bone konata kaj talenta poeto kaj literaturisto en sia lingvo, same kiel en Esperanto. Li skribas al ni:

«Mi sendas al vi mian skizon «Virino vendas flo-rojn» por Oomoto Internacia, kiu estas, laŭ mia modesta opinio bona Esperanto gazeto. Bedaŭrinde mi ne povas ofte havigi al vi artikolojn, ĉar mi ja estas kunlaboranto de multaj gravaj, germanlingvaj gazetoj,

kiuj pagas al mi honorariojn. Tamen, mi volas fari kion mi povas por via subteniada, bela kaj bona gazeto!!!»

La Redakcio de Oomoto Internacia dankegas la komplimenton.

S-ro **E. Rodríguez**, Buenos-Aires, Sudameriko, skribas al ni :

«Dio donu al vi kaj al Oomoto forton kaj subtenon por sukcesigi la grandan idealon. Mi tre atente legis ĉion, kion vi (estimata sinjoro Major) skribas pri Homaranismo, kaj aliaj temoj. Mi tre multe simpatias kun via alta idealo...»

La redaktoro de tiu ĉi gazeto — ruĝa pro hontemo — dankas kaj, riskante ke oni akuzos lin pri malmolesteco... publikigas la aprobon de sudamerika amiko!

S-ro **Erna Keilich**, Troppa, Ĉeĥoslovakio, precipe laŭdas nian kurson pri Psikologio — kiun ni devis ĉesigi pro tio, ke la intereso ne estis sufiĉe vasta.

S-ro **Bazylo-Doroŝanko**, del. de UEA

en Votyn, Polujo skribas interalie :

«...bonvolu permesi sciigi al vi, miaj karaj fratoj, ke viajn eldonaĵojn kaj precipe la artikolojn pri majstro O. Deguĉi, mi tralegis antaŭ miaj amikoj-Esperantistoj, kiuj atente kaj fervore aŭskultis mian legadon. Mi ankaŭ volas informi vin, ke multajn el viaj artikoloj mi tradukis en la ukrainan lingvon, kaj ili ĉiuj kaŭzis varman aplaŭdon ĉe la legantoj...»

* * *

Jen ni publikigis 11 aprobojn venintajn el 8 diversaj landoj. Ni havas ankoraŭ multajn aliajn kaj sendube ricevos ankoraŭ multajn en la estonteco. Laŭbezone ni publikigos parton el ili. Tie ĉi ni mencias, ke ni intence ne publikigas laŭdajn opiniojn de niaj multnombraj japanaj amikoj — ĉar oni povus diri transmare, ke japano laŭdas japanojn. Ni tamen ne povas prisilenti la fakton, ke ni meritis la ŝaton kaj la amon de centoj da samideanoj tra la tuta Japana Imperio.

Revuo de l' Revuoj

«Kritiko estas facila, arto — malfacila.» Goethe

★ **BIBLIOGRAFIA GAZETO**, redaktoro K. Kalocsay, kvaronjara el- kaj al-dono de Literatura Mondo, Budapest. Ĝis nun aperis du numeroj. Ŝajnas al ni, ke la titolo de tiu ĉi gazeto estas pseŭdonimo — la ĝusta titolo devus esti «Intrigografia Gazeto». Efektive, post la jezuita* kondutmaniero de L. Totŝe, kiu predikas akvon kaj drinkas brandon en n-ro 1, aperis ĉefartikolo en n-ro 2, subskribita de L. Tranĉe, por ke oni povu facile rekonii la veran aŭtoron kaj por eviti, aliflanke, ĉiun respondecon personan. Ni malaprobas kaj markas tian malkuraĝan sintenadon.

Bergson pravis, kiam li asertis, ke estas neutile refuti maljustajn atakojn. Estas pli bone publikigi pozitivajn asertojn kiuj prezentas veran progreson. K. Kalocsay montris sian superecon en tiu ĉi senco,

* la vorton «jezuita» ni uzas laŭ senco 2 de la Plena Vortaro, kiu kompreneble enhavas nenian malestimon al la honorinda katolika monaĥa ordeno de l' Jezuitoj.

ĉar li ne partoprenas polemikojn sed daŭrigas sian laboron sincere. Ni gratulas lin pro tio tute senkaŝe. Bedaŭrinde, la lakeo ne sekvas la sintenon de sia mastro: ni ne scias kial oni permesas, ke sur la paĝoj de tia altnivela organo kiel Literatura Mondo aperu mensogaj asertoj, ke iu darfu, durfu aŭ licu atribui al sia antagonisto opiniojn, kiujn ne la antagonisto, sed li mem havis! Sciante, ke li ne povas konvinki tian obstinan kapon per argumentoj, ni preferas fari senpersonan kaj kreaan laboron, ĝuste en la bergsona senco: iom post iom ni publikigos niajn Kritikajn Principojn en la formo de Konsiloj al Recenzantoj, kiujn oni bonvolu legi de nun en Oomoto Internacia. Tiuj principoj estas vera gvidilo por ĉiu intelekto honesta recenzanto.

★ **LITERATURA MONDO**, Majo. Malgraŭ niaj detalaj recenzoj kaj varma rekomendo pri Literatura Mondo, eĉ ne unu fojon aperis inda recenzo pri nia gazeto en ĝi. Oomoto Internacia estas nuntempe la

plej granda internacia Esperanto-gazeto: en ĝi aperas tre diversaj artikoloj kaj la celo de nia gazeto estas la alproksimigo de ambaŭ kulturoj okcidenta kaj orienta. Inter niaj kunlaborantoj troviĝas eminentaj Esperantistoj diverslandaj, inter kiuj Julio Baghy, kiu antaŭ nelonge estis ĉefredaktoro de Literatura Mondo mem kaj kiu ankoraŭ regule kunlaboradas al ĝi. Kial do Literatura Mondo tiel obstine neglektas kaj ignoras nin? Ĉu eblus, ke la kaŭzo estas la fakto, ke ni kritikis kelkajn punktojn en Literatura Mondo? Ni ne emas supozi tion. Verdire, ni ne nur kritikis malbonaĵojn sed ankaŭ elmontris bonajn flankojn kaj ĉiam sincere rekomendis la gazeton kaj daŭrigas rekomendi ĝin al nia legantaro. Ni postulas pli grandaniman traktadon flauke de Literatura Mondo!

J. Major

★ **POLITIKA SOCIALA REVUO**, n-ro 1 (Marto), eldonejo Felix Alcan, Parizo. Malgraŭ la krizo jen aperis nova fika periodaĵo, kiu meritas nian tutan atenton. Grava okazaĵo estas en nia literaturo la apero de altnivela revuo, kiun eldonas tia unuaranga franca eldonejo kia la bone konata Alcan. De la tempo, kiam Hachette aperigis esperantaĵojn, ne okazis tia fakto en Esperantujo. La enhavo de la Revuo estas plej altnivela: oni nur publikigas en ĝi tradukaĵojn de bonekonataj ekspertoj. Kvankam la Redakcio anoncas, ke oni aperigos artikolojn de diverslingvaj aŭtoritatuloj, tiu ĉi unua numero nur enhavas kontribuaĵojn de francalingvanoj. Interesege estas la artikolo pri Charles GIDE de Ch. Rist, eminenta juristo — kiun la recenzanto estas feliĉa kalkuli inter siaj iamaj profesoroj en Parizo. Aliaj artikoloj estas: «Efikoj de la ekonomia krizo sur la spirita vivo en Germanujo» de D-ro P. Jacob (tre aktuala temo!) kaj «La franca karaktero vidalvide al la moderna mondo» de A. Siegfried, franca Akademiano. Krom unu traduko, kiu estas subskribita de A. Esselin — ĉiuj aliaj tradukaĵoj estis farataj de G. W. — sub kiu pseŭdonimo ni kredas rekonii la stilon de Prof. Waringhien. La lingvaĵo de la Revuo estas bona sed... ĝi povus esti ankoraŭ pli bona. Neniu klarigo troviĝas pri la neologismoj, sufiĉe senĝene provizitaj tra la tekstoj. Preseraroj estas pli ol allaseble, la prezo estas sufiĉe alta (40 frankoj poĵare, por 4 numeroj), la broŝado estas primitiva kaj la preso ne unuaranga, kiel oni povus esperi ĉe tia altklasa eldonejo kaj tia alta prezo. Sed ni ne estu tro severaj; temas ne pri belarta sed pri ekonomiscienca publikaĵo kaj el la vidpunkto de

soci-ekonomio, la inteligenta leganto trovos valoregan materialon por la nutrado de sia spirito, se malavare kaj senprokraste li abonos la Revuon, al kiu ni deziras longan vivon kaj prosperon.

J. Major

★ **ESPERANTO** de UEA, aperas ĉiumonate kun gvidartikolo de D-ro E. Privat. Altnivela enhavo, tre rekomendinda. La aprila numero enhavas rimarkindan artikolon de E. Privat pri la filozofiema mondkompreno en Hindujo. Estas refreŝiga legaĵo por recenzanto, kiu spiradas la senintelektan atmosferon de nia milkapa gazetaro... Sed, kara redaktoro de **ESPERANTO** — kondiĉe ke vi entute legas nian modestan gazeton, kial vi neniam recenzas? Ĉu eble la organizbatalaj artikoloj forglutas vian tutan spacon? Sinceran kondolencon!

★ **HEROLDO DE ESPERANTO** aperas ĉiam regulege kaj meritas la titolon de la ĉiusemajna, ilustrita, neŭtrala kaj laste, sed ne malgrave, — ĉiam aktuala kaj interesege Esperanto Informilo.

★ **ESPERANTO-ROMAN-GAZETO**, eldonanto kaj respondeca redaktoro: Friedrich Ellersiek, L. K., Berlino. Ok-paĝa periodaĵo, nove aperanta, malgraŭ la malfacilaj tempoj. Por tiuj, kiuj ŝatas legi «daŭrantaju» romanojn — kaj memori la intrigojn dum monato aŭ pli, sen intermiksi la temojn de la paralele aperantaj rakontoj — por tiuj ni varme rekomendas la gazeton. Aprobinda estas la detalaj klarigoj pri la vortoj, ĉe la fino.

★ **LA ESPERANTA GAZETO**, Amsterdam; aperas regule ĉiusemajne sur 12 oktavaj paĝoj. Ĉiu numero enhavas ion pri Universala Homama Asocio.

★ **ESPERANTO LANDO**, n-ro 14 estas por januaro-majo; New-Jersey, Usono.

★ **FRATECO**, monata, aperas en Burgas, Bulgarujo. Enhavo spiritualisma, preso plaĉa, rekomendinda.

★ **USE—EHO** (Timisoara, Rumanujo) propagandas Esperanton sub la nomo: «la Eŭropa Lingvo». Jes, sed kion pri ni, azianoj??

Nacia Esp. Gazetaro

El ĉiuj naciaj organoj la plej bela kaj bonenhava estas sendube **LA MOVADO** (Parizo), aperanta ĉiumonate kun Esp. kaj franca tekstoj, kaj belaj ilustraĵoj. Rekomendinda al tiuj kiuj interesiĝas pri Francujo kaj la franca lingvo. ★ **GERMANA ESPERANTISTO** estas pli modestaspekta, sed la

enhavo eble despli serioza (plejparte germane).
 ★ THE BRITISH ESPERANTIST apartenas ankaŭ al la plej plaĉaj naciaj organoj. ★ LA SUDA KRUCO (Aŭstralio) estas decide la plej literature altnivela el ĉiuj. En la februara numero ni legas («El Rumana Plumo» de H. Fischer), ke Turkujo estas en la... «ekstrema oriento». Ĝis nun ni kredis, ke nia redakcio situas en tiu mondparto, sed nun ni vidas, ke ni eraris! ★ L' ESPERANTO aperas grandparte itallingve; granda formato, plaĉa aspekto, senriproĉa preso. ★ LA SUDA STELO estas ankaŭ laŭdinda (Jugoslavio). La maja numero enhavas tre detalan recenzon pri la Hungara Antologio el la plumo de Mavro Špicer, kiu estas des pli atentinda, ĉar la aŭtoro komprenas la hungaran lingvon. Estas karakterize, ke li ankaŭ kondamnas neologismemon de l' hungaraj samideanoj.

Aliaj gazetoj ricevataj:


★ FLANDRA ESP-ISTO ★ LINGVO INTERNACIA (Greka) ★ NEDERLANDA ESP-ISTO
 ★ POLA ESP-ISTO ★ BULGARA ESP-ISTO
 ★ BELGA ESP-ISTO ★ KATALUNA ESP-ISTO
 ★ ARGENTINA ESP-ISTO ★ LA PROGRESO (Ĉeĥa) ★ BULTENO (Ĉeĥa) ★ ONDO DE DAŬGAVA (Latva) ★ NORVEGA ESP-ISTO
 ★ INFORMOJ (Estono) ★ LIGILO (Ĉeĥa) ★ DANSK ESP.-BLAD (Dana)

Faka Esp. Gazetaro

★ JUNA ESP-ISTO (Krakovo) ★ BULTENO (Moskvo) ★ LA JUNA BATALANTO KATOLIKA (Köln) ★ LA SOCIALISTO (Vieno); ĝia moto estas «Per Espo por Socialismo» kaj efektive, anstataŭ furorvortojn, ĝi komunikas interesajn kaj bone trapensitajn artikolojn, en vere bela formo.
 ★ ESPERO KATOLIKA (Collell, Hispanujo) ★ LA INTERLIGILO DE L'P.T.T. Poŝta fakrevuo (Parizo) ★ AŬRORO (Praha) per Braille-sistemo, por blinduloj. ★ INTERNACIA MEDICINA REVUO (Uccle, Belgujo) ★ SCIENCA GAZETO (Usono) ★ LA KOMERCO (Dresden Germanujo) ★ SVEDA LABORISTA ESP-ISTO ★ FLUGANTA SKRIBILO (Issy-les-Moulineau, 9 Bvd Voltaire, Seine, Francujo) nepre koninda por stenografistoj! ★ LA MILITREZISTANTO (Enfield, Anglujo)

Naciaj revuoj ricevitaj

★ «Bolletín de la Asociación de Bahía Blanca» (kun Esp. kolono) ★ MINARETEN (dana) kun pri-Esp.a kolono ★ THEOSOPHISCHE KULTUR (Leipzig) ★ **DIE WEISSE FAHNE (Pfullingen, Germanujo) organo de nia fratmovado NEUGEIST.** ★ «La Tribune Esperantiste» (franca propaganda organo) ★ «Pestry Tyden» (Praha) ★ «The Trans-Pacific» (Tokio) ★ UNITY (Chicago, US) ★ «The Temple Artisan» (Halcyon, Cal, US) ★ «La Luz del Porvenir» (Barcelona) ★ «Vegetarismul» (Bucuresti) ★ «La Revue Caodaiste» (Hindoĉinujo) ★ «A Nova Era» (Sao Paulo) ★ «La Revue Spirite» (Paris) ★ «The Animals Champion» (London) ★ **LA NORDA BRILO estas japanlingva organo de Oomoto-movado por Hokkaido — kaj enhavas Esp. kolonon sub la sperta redaktado de nia kolego, s-ro Nakamura. Petu specimenon de Oomoto, Jamabe, Hokkaido, Japanujo.**



Vespero en Singapore.

«Sen serioza peno morala perfektigo estas neebla.» «Ĉio kio unuigas homojn estas bona kaj bela; ĉio kio dividas ilin estas malbona, monstra. Ĉiu scias tiun ĉi verecon; ĝi estas konservata en nia koro.»

«Ni estas dividitaj de ĉiuj vivantaĵoj ekstere, sed interne ni ĉiuj estas kunligitaj.»

LEO TOLSTOJ

Ĉieliro de Sinjorino Joneko UEDA

SINJORINO Joneko UEDA estas la patrino de Majstro O. Deguĉi. Ŝia familio okupiĝis pri agrikulturo en la vilaĝo Anao, proksima al Oomoto-Teritorio de Kameoka.

En la komenco de la lasta junio ŝi ekhavis intestomalsanon kaj ŝi estis zorge flegata de siaj familianoj kiuj varme preĝis por ŝia resaniĝo. Tamen, du semajnojn poste, la 20an de la sama monato venis la lasta tago de ŝia 86 jara vivo en la tera mondo. Tion ŝi matenon ŝi subite eniris en la stacion de komao. Kiam ĝis sinjoroj Deguĉi vizitis la patrinon, momente ŝi respondis ilin per rideto kaj baldaŭ en paca atmosfero de preĝvortoj recitataj de la Majstro ŝia nobla animo trankvile reviviĝis en la meritita Ĉielregno, ricevante la adiaŭon de multaj parencoj kaj vilaganoj.

La enteriga ceremonio estis plej solene okazigata laŭ Oomoto-ritoj, la 22an de junio posttagmeze. En la mezo de la ceremoniejo oni metis la ĉerkon kun portreto milde ridetanta kvazaŭ viva, kaj starigis antaŭ ĝi monton da oferaĵoj. La korto estis dekoraciita per centoj da standardoj de Oomoto-filio kaj de girlandoj. Ĉirkaŭ milo da Oomotanoj kaj multaj aliaj, kunvenintaj ne nur de proksime sed ankaŭ de diversaj lokoj tre malproksimaj, kompakte plenigis la tutan lokon. Alvenis kondolencoj de reprezentantoj de Oomoto kaj pluraj organizaĵoj; okazis deklamo de tri centoj da kondolenc-telegramoj senditaj el

ĉiuj lokoj tra la lando, eĉ de *Ponape*-filio en la Suda Oceano. Plej fine eksonis ĥoro de preĝvortoj de ĉiuj partoprenintoj. Kaj poste ili sekvis la ĉerkon ĝis la tombejo eĉ proksima montpiedo, kun la akompano de la muzikbando de Oomoto Junulara Ligo. La vico etendiĝis pli ol unu mejlon longa. Tiamaniere, eĉ la tuta subiro finiĝis la tuta enterigado malĝoja, tamen tre impona kaj pompa.

* * *



Sinjorino Joneko Ueda

Majstro Deguĉi estis denaske tre zorgema al la gepatroj, kaj estante en ĉi taga okupiteco kiel la ĉefo de movado, lia milda koro estis ĉiam plena de deziro pri pli feliĉa kaj komforta vivo de la patrino. Kaj ofte li rekomendis al ŝi pasigi la maljunecon apud si en Oomoto-Teritorio de Kameoka, aŭ invitis ŝin al florguado en ĉiu printempo kaj aŭtuno, kaj al diversaj aliaj amuzaĵoj... Tamen ŝi preskaŭ neniam akceptis tion kun la respondo:

«La homoj estas naskitaj por labori kaj ankaŭ mi havas mian propran laboron. Ke ni po as laboradi en bona sano, tio estas la plej granda Dia favoro komparebla al nenio...»

Vere lia tuta vivo de 86 jaroj estis laboro mem, kiu estis por ŝi la plej granda plezuro. Ŝi estis tre sana kaj estante eĉ tiom maljuna ŝi satis labori en kampo aŭ iri al monto por hejtajo. Aliflanke, ŝi fariĝis tre fervora Oomotanino laŭ la gvido de la Majstro mem kaj ankaŭ de lia mal-

pliaga frato, kiun la Majstro sendis al Anao por prizorgi la maljunan patrinon. Tiamaniere si ĝuis la Naturon kaj fervore servis al Dio.

En la tago de sia ĉieliro, la Majstro estis melankolia kaj diris al vizitantoj:

«Pro la maltrankvileco pri sia sano, lastatempe mi rifuzis ĉiujn petojn pri vojaĝo kaj sole deziris prizorgi al la patrino. Estas granda bedaŭro, ke mi perdis la patrinon hodiaŭ. La 20a de junio estas ial mistera tago por la familio Ueda. Hodiaŭ estas ĝuste tiu tago, en kiu mia avo ĉieliris en la aĝo de 54 jaroj, kaj samtempe por mi estas memorinda tago, t. e. en 1924, kiam mi ankaŭ estis 54 jara, mi estis mortkondamnita en Mongolujo kaj kune kun kelkaj akompanantoj starigis antaŭ la pafiloj. Kaj estinta ankaŭ 54 jaraĝa, mia patro *Kiĉimacu* ĉieliris unu tagon poste, la 21an de Junio.»

H. Jamakaŭa



★ **Somera Oomoto Kurso en Kameoka.** Kutime en somero Oomoto havas someran kurson, speciale aranĝitan kun pli novaj lekcioj ol ordinara semajna kurso okazigata tra la jaro. Ankaŭ ĉi-jare ĝi malfermiĝis la 7an de julio kaj daŭros ĝis la 8a de septembro. Unu kurso finiĝas ĉiusemajne, dum kiu entute jenaj 14 lekcioj estas donataj: spiritualismo; la tri grandaj demandoj de l' homa vivo; Dio kaj demono; unuiĝo de Dio kaj homo; biografio de Oomoto Fondintino Nao Deguĉi kaj de Majstro Onisabro Deguĉi; unuiĝo de religio kaj politiko; arto — la patrino de religio; principoj de Oomoto; Oomoto-Movado; Oomoto instruo kaj la nuna mondo; Dia plano por mondsavado; japana nacieco kaj universala vojo; diversaj pri religikredo.

Pritraktante diversajn demandojn Oomoto donas decidajn solvojn laŭ Dia vero. Nun-



Esp. kunveno en Ŝanhaja Oomoto Domo.
S-ro Hidemaru (mezo de I-a vico)

tempe partoprenas ĉirkaŭ 400 kursanoj el diversaj partoj de la lando.

★ **Propagandvojaĝo de Sinjoro Hidemaru Deguĉi en Ŝanhajo.** La 20an de aprilo Sinjoro Hidemaru alvenis al Ŝanhajo akompanate de sia sekretario E. Ito por propagando de nia movado. Ĉiutage li estis tre okupata, ĉu pri paroladoj, pri vizitado al diversaj grupoj, aŭ pri ĉeesto al Esperantaj kaj aliaj kunvenoj.

La 7an de majo estis vigle okazigata la inaŭguro de Oomoto Domo de Ŝanhajo en lia ĉeesto. Estas komprenebla fakto, ke multaj eniris en firman Di-kredon laŭ liaj ĉiam edifaj paroloj; ke ĉirkaŭ li, kiel kutime, oni spertis miraklajn resaniĝojn; ke laŭ lia eksterordinara spiritforto pluraj ateistoj havis diversajn spertojn kaj konvinkiĝis pri la ekzisto de Dia Spirito... Tiamaniere la famo de Sinjoro Hidemaru Deguĉi baldaŭ disvastiĝis en la tuta urbo kaj novaj vojerĉantoj sinsekve venadis por renkonti lin. Tiel lia energia kaj efika laboro donis grandan influon kaj la tiea propagando tre faciligis.

Dum sia sencesa okupiteco li tamen trovis ankaŭ liberan hereton por sia ŝatata Esperanto lernado kaj kelkfoje li mem skribis interesajn poŝtkartojn Esperante al nia redakcio. Dum 2 monata restado tie lia akompananto s-ro Ito gvidis Esperantajn kursojn, kaj ili havis multajn fremdlandajn amikojn Esperantistajn precipe ĉinajn. Nuntempe S-ro Hidemaru estas en U.H.A.-ĵurnalejo, en Tokio.

Enhavo

Epitafe al la Ekonomia Konferenco	3	Japana legendo — La spegulo de Macujama	18
Estu larĝvida	4	Studo pri la japana mito de «sinpurigo»	20
Kokoro (2)	6	La venĝo de serpentoj	23
Orienta filozofio	9	Japana Lingvo por Esperantistoj (12)	24
La Universo de Dio revelaciita (1)	11	Literatura kritiko	26
Polpo kaj kato	15	Ĉieliro de Sinjorino Joneko Ueda	32
Ĉu io bona venis el Nazareto? (2)	16	Oomoto kroniko	33

★ **El Esperanto Propaganda Asocio, Kameoka.** Utiligante la okazon de la somera Oomoto kurso, nuntempe oni arangas someran Esp.-kurson ĉefe por Oomotanoj. Lernantoj estas ne tre multaj, sed ili lernas tre diligente.

Lastatempe E.P.A. pretigis du specojn de Esperantaj diskoj, kiuj bone sukcesis kiel propagandilo kaj samtempe pliperfektigilo. Ilin enparolis nia redaktoro s-ro J. Major. Inter la tekstoj estas «Kial japanoj lernu Esperanton?» Tio estas tre satata temo de japanoj kaj jam multaj mendoj venis al E.P.A.

★ **La 21a Japana Esperanto Kongreso.** Bonvolu atenti, ĉar la tago de la Kongreso estas ŝangita. La Kongreso okazos de la 3a ĝis la 5a de novembro, en la malnova ĉefurbo KIOTO kaj en nia KAMEOKA. Ĉiuj estas bonvenaj. Venu multope!

Ni kore dankas al niaj legantoj, kiuj jam sendis siajn gratulojn al la **10-jara Jubileo de Oomoto-Esperantistoj**, kiu okazos dum la Kongreso.

Abonu senhezite!

Reabonu senprokraste!

Varbu energie!

al Oomoto Internacia!

Sendu artikolojn publikigindajn!

al Oomoto Internacia!

★ INTERŜANĜO

Ni interŝanĝas reklamon kun tutmondaj Esp-aj gazetejoj. Tiuj, kiuj volas tion fari, tuj sin turnu al ni kun siaj reklamtekstoj kaj specimena gazeto. Ni estas ĉiam pretaj por reciproka servo.

La Redakcio

TARIFO DE OOMOTO INTERNACIA

Abonkotizo: (afrankite)

Abonanto: 1 usona dolaro, 5 sv. fr., aŭ ĉiu egalvaloro.

Subtenanto: 4 usonaj dolaroj por 5 jaroj.

Dumviva abonanto: 10 usonaj dolaroj.

Reklamo: Tuta pago: 20 sv. fr., duona pago: 10 sv. fr.

Anonceto: 5 linioj 2 resp.-kup. Por 6 foja enpresado — kvarobla prezo.

Multaj premioj estas dissendataj.

Ĉiu abonanto rajtas enpresigi du senpagajn anoncetojn jare.

La abonkotizon sendu rekte al Oomoto Centra Oficejo, Kameoka.

定價 壹部 貳拾錢	壹ヶ年 貳圓四拾錢
昭和八年八月一日印刷	昭和八年八月一日發行
編輯發行印刷人 御田村龍吉	京都府南桑田郡龜岡町 荒塚字内丸一
印刷發行所 天聲社	(替振大阪75917番) 全

Oomoto Presejo, Ten'on-kjo, Kameoka.

OOMOTO INTERNACIA

Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.



KAMEOKA, dato de la poŝta stampo.

Estimata Samidean(in)o!

Per la sama poŝto ni sendas al vi specimenon de nia gazeto OOMOTO INTERNACIA kaj ni petas, ke vi bonvolu ĝin tralegi kun atento. Vi tuj rimarkos, ke OOMOTO INTERNACIA estas unu el la plej seriozaj gazetoj en Esperanto. Nia celo estas diskonigi la instruojn de la Oomoto-Movado, pli bone konigi la malproksiman Orienton al la mondo per la Internacia Lingvo kaj doni modelan legaĵon al la Esperantistaro. Komence de Januaro 1933 nia gazeto aperas ĉiumonate sur grandformataj paĝoj kun tre varia enhavo, kiel vi mem povas juĝi konsultante la specimenon. Sed ni ne volas halti ĉi tie, ĉar ni celas konstantan progreson. Ni varme akceptos viajn kritikojn kaj sugestojn kaj ni jam nun dankas vin anticipe por via bonvola kunlaboro. Ni intencas konstante plibonigi nian gazeton kaj la nuna jaro estas kvazaŭ transira periodo al multe pli alta nivelo ankoraŭ. La estonto estas la nia!

Ni firme kredas, ke la mondo estas savebla nur per la spirita kunfando de ambaŭ Okcidento kaj Oriento. La celo de nia gazeto estas kunlabori al tiu grandioza intersanĝo de ideoj — per Esperanto. Pere de nia entrepreno, la tuta Esperanto-Movado akiros grandan gloron kaj meritojn la dankon de la Homaro. Ĉu vi aŭdos nian voĉon? Ĉu vi aliĝos al la taĉmento de la Progreso? Ni firme kredas, ke jes!

Nia entrepreno ne estas bazita sur profitemo kaj mono. Ĉiuj Oomotanoj laboras senegoisme, nur por la bono de la Homaro. Nia gazeto estas presata en la granda kaj nova Oomoto-presejo de Kameoka per centoj da « labor-oferantoj » meze de vera Esperanto-Gardenurbo. La utopio de la jarcentoj jam efektiviĝis inter pitoreskaj montoj kaj valoj de Japanujo... Sed ni bezonas monon por aĉeti materialojn. Ni bezonas abonantojn. Niaj kotizoj estas la plej malkaraj — ili eĉ ne kovras la prezon de papero, ĉar Oomoto grandanime subtenas nian propagandon per Esperanto. Vi do kaptu la okazon kaj rapide bonvolu sendi vian abonkotizon kaj eventuale subtenon. Antaŭe vi ricevu nian elkoran dankon. Ĉi sube vi trovos nian novan tarifon.

Koogecu NIŠIMURA

ĉefredaktoro

Jozefo MAJOR

redaktoro

Abonkotizo: **Abonanto:** OOMOTO INTERNACIA por 1 jaro: 1 usona dolaro aŭ egalvaloro.

Subtenanto: 4 usonaj dolaroj por 5 jaroj.

Dumviva abonanto: 20 usonaj dolaroj.

Multaj premioj estas konstante dissendataj.

Ĉiu abonanto rajtas enpresigi du senpagajn anoncetojn jare.

Korespondaĵojn kaj monon sendu al la sekvanta adreso:

OOMOTO INTERNACIA — KAMEOKA (Kioto-hu) JAPANUJO

OOMOTO INTERNACIA

Oomoto Internacia estas la plej granda Esperanto-gazeto!

Oomoto Internacia aperas ĉiumonate sur 32 grandformataj paĝoj kun riĉa enhavo.

Oficiala organo de Universala Homama Asocio, **Oomoto Internacia** batalas por disvastigo de Homaranismo!

Oficiala organo de Oomoto Movado, **Oomoto Internacia** batalas por spiritalisma mondkompreno!

Ilustrita, kultura, Esperanta, literatura kaj vere internacia, **Oomoto Internacia** kreis rekordon ne nur laŭ kvanto sed ankaŭ la valoro de l' enhavo.

Orienta Kulturo, Filozofio, Literaturo, Novspirito, Japana Vivo, Japanlingva Kurso, Literatura Kritiko estas nur kelkaj el la konstantaj rubrikoj de **Oomoto Internacia**.

Eminentaj esperantistoj, mondkonataj, kunlaboras al la redaktado de **Oomoto Internacia**.

Legu **Oomoto Internacia**, ekkonu la vivon de l' Oriento kaj akiru tutmondan horizon!

Senhezite abonu al **Oomoto Internacia**, kiu estas la plej malkara kaj samtempe la plej arta kaj bonenhava gazeto en Esperantujo!

Jarabono de **Oomoto Internacia** estas nur 5 sv. fr., 1 dol. usona, aŭ egalvaloro. La kotizon sendu rekte al la Administracio, Kameoka.

Oomoto Internacia donas diversajn avantaĝojn: premioj, 2 senpagaj anoncoj ĉiujare, ktp. estas donacataj.

Ĉiu persono, kiu varbas 6 novajn abonantojn, senpage ricevas **Oomoto Internacia** por la tuta jaro.

Por konstanta plibonigado, **Oomoto Internacia** bezonas vian subtenon kaj kunlaboron! Petu senpagan specimenon!!

**Redakcio kaj Administracio de OOMOTO INTERNACIA,
Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.**

ABONILO

Al la Administracio de OOMOTO INTERNACIA,
Kameoka, Kioto-hu, Japanujo,

Dato, _____

Mi deziras aboni la gazeton Oomoto Internacia kaj nun sendas al vi 5 sv. fr., 1 usona dol., aŭ la egalvaloron en _____. Bonvolu sendi la gazeton O. I. komence de N-ro _____.

Nomo: _____

Adreso: _____

Se eble, bonvolu sendi poŝtmandate,
papermonojn nepre rekomendite.

NIAJ REPRESENTANTOJ

Anglujo	S-ro G. Tordoff, 82, Pendennis Parko, Bris- lington, Bristol.	Francujo	S-ro Simon Frantz, 21, rue Alain Chartier, Paris XV.	S-ro Giulio Matuella, Corso Garibaldi 325, Mazzolombardo (Torento).	
Aŭstralio	S-ro L. Thomson, c/Esperanto Society, WEA. Rooms, 449a Pitt Street, Sydney.	Germanujo	S-ro Kurt Wuensche, Augustenstr. 17, Leipzig-R. S-ro Anton A. Ehm, Zittau. Sa., Stefanstr. 11.	Jugoslavujo	S-ro Marko Dominis, Split Zminpka Str. No I d.
Aŭstrujo	D-ro Karl Mimler, Hettenkofenstr. 21, Wien XVI. S-ro Bernhard Selzer, Ettenreichgasse, 4, 31 Wien X		S-ro Gottlieb Strofsner, Munchen S. 50. Bavarujo, Dietramszellestr. 10. 21.	Latvujo	S-ro Karlo Šubergs, Riga, Milgravis azera str. 6--1.
Brazilo	S-ro Majumi Kondo, Caixa postal 3594, S. Paulo.		S-ro K. O. Schmidt, Brixstr. 8 a, Flensburg. S-ro F. Bachmann, Bahnhofstr. 3/1. Heilbronn.	Litovujo	S-ro Andrius Borkaskas, Šiauliu g-ve 86, Radviliškis.
Bulgarujo	S-ro Ivan Kirov, Popska, 484 Sliven. S-ro Georgi Dončev, str. oficerska 25, Tirmovo. S-ro Atanas Nikolov, str. Car Ivan Ŝišman. 19, Burgas.	Hindujo	S-ro Liem Tjong Hie, Semarang, Karangtoeri 66, Java.	Nederlando	F-ino G. de Waart, Box 23, Hilversum.
Ĉeĥoslovakujo	S-ro Rudolf Burkert, Kalvariengasse 34-IV, Nie- mes. S-ino Sofie Ciperá, Plzen III, Zizkova 52.	Hispanujo	S-ro Francisko Miralles, Hellin (Albacete). S-ro Salvador Viladelmas, Colon 52-54, Sabadell (Bar- celono).	Novzelando	F-ino Coralie Smythson, 47A Aurora Terrace, Wellington.
Danujo	S-ro Harry E. Jensen, Reberbangade 10, Aalborg.	Hungarujo	S-ro Paŭlo Balkanyi, Poŝto 507, Budapest.	Persujo	S-ro Dariuŝ Nemseĉi, Tabriz.
		Ĥinujo	S-ro Sh. M. Chun, N.Y.M.S. Lunghuwa, Shanghai.	Polujo	S-ro Adolf Oberrotman, Varsovio, Krak—Przedm 10 S-ro Denysiuk Les, Dolina, Rachin 20.
		Italujo	S-ro Luigi Minnaia, Via del Giglio 16, Roma 115.	Svisujo	S-ro Karl Jost, Stolzesstr. 7, Zürich 6.
				Usono	S-ro John Lester Lewine, 150 E. 72 nd. St. New York S-ro K. A. Suzuki, Orange Petroleum Co. Ora- nge (Texas)

Literatura Mondo

Literatura, kultura kaj bel-
aspekta gazeto en Esperanto.

Aperas monate, en 16 paĝoj,
sur arta kaj grandformata pa-
pero, riĉe ilustrita.

Ĉefredaktoro: Kolomano Kalocsay
Kunlaborantoj: eminentaj esperant-
istaj verkistoj kaj tradukistoj.

Abonprezo: por jaro 1.80 us. dolaro.
duonjaro 1.00 us. dolaro.

Petu prospekton kaj specimenon kon-
traŭ 1. resp.-kupono al:

LITERATURA MONDO

Budapest, IX. Mester-utca 53. V.7. Hungarujo.

Bela literatura trezoro

Sinjoro Laŭdata

Originalaj poemoj, prozoj, frazoj
de 100 Esperantistoj, dediĉitaj al
Sinjoro Onisabro Deĝuĉi.
La dua luksa eldono, 200 paĝa.
stofbindita kun ora surpriso.

Mendu por 2.50 sv. fr. ĉe:

**Librofako de Oomoto Internacia,
Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.**

Germanlingva organo de Neugeist

Die Weise Fahne

Interesa kaj riĉenhava
organo de la Nov-
spirita movado por
germanlingvanoj.

Abonu por 2 germ. markoj ĉe:

NEUGEIST — Pfullingen i, Wurt,
Germanujo.

Heroldo **de Esperanto**

«Heroldo de Esperanto», la sola ĉiusemajna, superpartia ĵurnalo de Esperantujo, aperas en granda formato, kun bonaj kaj rapidaj raportoj pri la Esperanto-movado kaj el la tuta mondo. «Heroldo de Esperanto», riĉe ilustrita, sendependa de iu ajn organizacio, servanta al la tuta mondo, aperas jam de 14 jaroj tute regule.

Abonprezo: 3 gmk. (por 3 monatoj)

Petu senpagan specimenon, kun katalogoj de Esp-libroj ĉe:

HEROLDO DE ESPERANTO

Brüsseler Strasse 94, Köln,

Germanujo.

INTERNACIA MEDICINA REVUO

I.M.R. estas oficiala organo de Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio kaj monata ligilo de la kuracistoj, dentistoj kaj aliaj medicinrilataj profesiuloj. **I.M.R.** estas la sola pure scienca, tre serioza gazeto en Esperanto. **I.M.R.** aperas jam de 11 jaroj kun riĉa enhavo: originalaj artikoloj, terapeŭtikaj aktualaĵoj, referatoj, diversaĵoj...

Jarabono: 1 usona dolaro.

Senprokraste petu specimenon kontraŭ 1 resp.-kupono!

Redakcio kaj Administracio de T.E.K.A.

19, avenue Montjoie, Uccle 3,

(Belgujo).

